


FORMATO MARC 21

GUIDO POR GUA UZADO EN KATALOGADO



ANA MANERO
Versio: 02. 2026

FORMATO MARC 21

GVIDILO POR GÌA UZADO EN KATALOGADO

Ana Manero

(Versio: 02)

2026

Verkis: Ana M^a Manero García (biblioteko@esperanto.es)

Helpis per reviziado de versio 01: Marc Vanden Bempt kaj Ruben Fernández



Formato MARC 21

Tabelo de enhavo

Formato MARC 21.....	3
Tabelo de enhavo.....	3
Enkonduko	7
BIBLIOGRAFIA RIKORDO.....	8
000-Kapo	8
Kontrolkampoj	10
001 – Kontrolnumero.....	10
003 – Identigilo de la kontrolnumero	10
005 – Dato kaj horo de la lasta modifo de la rikordo.....	10
006 – Informkodoj de fiksa longeco. Karakterizaĵoj de la aldona materialo	10
007 – Fiksa kampo de fizika priskribo. Ĝenerala informo.....	11
008 – Informkodoj de fiksa longeco. Ĝenerala informo	11
Komunaj pozicioj por ĉiuj materialoj	11
Pozicioj 18-34 specifaj por libroj.....	14
Pozicioj 18-34 specifaj por komputilaj dosieroj.....	17
Pozicioj 18-34 specifaj por seriaĵoj.....	17
Pozicioj 18-34 specifaj por muziko.....	20
Pozicioj 18-34 specifaj por vidaj materialoj	22
Kampoj pri numeroj kaj kodoj.....	23
020 – ISBN (International Standard Book Number = Internacia Norma Libro-Numero) (R).....	23
022 – ISSN (International Standard Serial Number = Internacia Norma Numero por Seriaĵoj)(R)	24
024 – Aliaj normigitaj identigiloj (R).....	25
028 – Numero por eldonanto aŭ distribuanto (R)	26
040 – Fonto de la katalogado (NR).....	28
041 – Lingvokodo (R).....	29
Kampoj rilataj al la bibliografia priskribo	31
240 – Unuforma titolo (NR)	31
243 – Kolektiva unuforma titolo (NR)	32
245 – Mencio pri titolo kaj mencio pri respondeco (NR).....	33
246 – Titolvarianto (R)	35
250 – Mencio pri eldono (R)	37
264 – Produktado, Publikigo, Distribuado, Fabrikado kaj Kopirajto (R)	38

300 – Fizika priskribo (R)	39
310 – Nuna periodeco (R)	40
321 – Antaŭa periodeco (R)	41
336 – Tipo de enhavo (R)	41
337 – Tipo de medio (R)	42
338 – Tipo de portilo (R)	43
347 – Teknikaj detaloj de la bita dosiero (R).....	44
362 – Datoj de publikigo kaj/aŭ sinsekva nomado (R).....	44
490 – Mencio pri serio (R).....	46
Kampoj pri notoj	47
500 – Ĝenerala noto (R).....	47
502 – Noto pri disertacio (R).....	47
504 – Noto pri bibliografio (R)	47
505 – Noto pri enhavo (R).....	48
511 – Noto pri partoprenantoj aŭ interpretistoj (R).....	49
515 – Noto pri apartaĵoj de la numerado (R).....	49
525 – Noto pri suplemento (R).....	50
530 – Noto pri plia disponebla formato (R)	50
534 – Noto pri la originala versio	50
538 – Noto pri la postuloj de la programo (R)	51
546 – Noto pri lingvo (R)	52
550 – Noto pri respondeca korporacio (R).....	53
580 – Noto pri kompleksa rilato (R).....	53
586 – Noto pri premioj (R)	54
588 – Noto pri la fonto de la priskribo (R)	54
Kampoj rilataj al la alirpunktoj	55
Ĉefaj	55
100 – Ĉefa alirpunkto. Nomo de persono (NR).....	55
110 – Ĉefa alirpunkto. Nomo de korporacio (NR).....	56
111 – Ĉefa alirpunkto. Nomo de kongreso (NR)	57
130 – Ĉefa alirpunkto. Unuforma titolo (NR).....	58
Sekundaraj	58
700 – Sekundara alirpunkto. Nomo de persono (R)	58
710 – Sekundara alirpunkto. Nomo de korporacio (R)	59
711 – Sekundara alirpunkto. Nomo de kongreso (R).....	59
730 – Sekundara alirpunkto. Unuforma titolo (R)	60

740 – Sekundara alirpunkto. Nekontrolita/analiza titolo (R).....	60
Interligaj kampoj	61
760-787 – Interligaj kampoj. Ĝenerala informo.	61
770 – Ligilo al suplemento/speciala numero (R).....	64
772 – Ligilo al la ĉefa eldonaĵo (R).....	65
773 – Ligilo al la fonto-dokumento (R).....	66
774 – Ligilo al komponanta parto (R).....	67
775 – Ligilo al alia eldono (R)	68
776 – Ligilo al alia fizika formato (R)	68
780 – Ligilo al antaŭa titolo (R)	69
785 – Ligilo al posta titolo (R).....	70
787 – Aliaj rilatoj	71
856 – Elektronikaj lokalizo kaj aliro (R)	71
880 – Alternativa grafika reprezento (R)	72
AŬTORITATA RIKORDO	75
000-Kapo	75
Kontrolkampoj	75
001 – Kontrolnumero	75
003 – Identigilo de la kontrolnumero	75
005 – Dato kaj horo de la lasta modifo de la rikordo.....	75
008 – Informkodoj de fiksa longeco. Ĝenerala informo	75
Kampoj pri numeroj kaj kodoj.....	75
024 – Aliaj normaj identigiloj (R).....	75
040 – Fonto de la katalogado (NR).....	76
Kampoj pri ĉefaj alirpunktoj.....	76
100 – Ĉefa alirpunkto. Nomo de persono (NR).....	76
110 – Ĉefa alirpunkto. Nomo de korporacio (NR).....	78
111 – Ĉefa alirpunkto. Nomo de kongreso (NR)	79
130 – Ĉefa alirpunkto. Unuforma titolo (NR).....	81
Kampoj por nomovariantoj – Referentipo: Vidu. (R)	82
Kampoj por nomovariantoj – Referentipo: Vidu ankaŭ (R).....	83
Kampoj por starigi kompleksajn referencojn.....	84
663 – Kompleksa referenco: Vidu ankaŭ (NR)	84
Kampoj pri notoj	85
670 – Noto pri konsultita fonto (R)	85
EKZEMPLERA RIKORDO	86

000-Kapo	86
Kontrolkampoj kaj kampoj pri numeroj	86
003 – Identigilo de la kontrolnumero	86
005 – Dato kaj horo de la lasta modifo de la rikordo.....	86
008 – Informkodoj de fiksa longeco. Ĝenerala informo	86
040 – Fonto de la katalogado (NR).....	86
Kampoj pri notoj kaj lokalizo.....	86
561 – Historio pri proprieto kaj prizorgo (R).....	86
563 – Informo pri la bindaĵo (R)	87
852 – Lokalizo (R)	87
856 – Elektronikaj lokalizo kaj aliro (R)	89
866 – 868 Teksta mencio pri havaĵoj. Ĝeneral informo.....	89
866 – Teksta mencio pri havaĵoj. Baza bibliografia unuo (R).....	90
867 – Teksta mencio pri havaĵoj. Komplementa materialo (R).	90
868 – Teksta mencio pri havaĵoj. Indeksoj (R).	91

Enkonduko

Trovu en ĉi dokumento detalan instrukcion por kodi informon en bibliografiaj, aŭtoritataj aŭ priekzempleraj rikordoj.

Priskribo pri la formato mem, la strukturo de MARC-rikordo kaj la maniero labori per ĝi troviĝas en la responda enkonduko de la *Manlibro pri katalogado*.

La dokumento enhavas nur la plej uzatajn kampojn por la kreado de la tri tipoj de rikordoj. Kaze, ke vi ne trovos respondon en ĉi mallongigita gvidilo, konsultu rekte la originalajn formatojn, kies retaliraj ligiloj troviĝas komence de la respondaj sekcioj.

BIBLIOGRAFIA RIKORDO¹

000-Kapo

Ĝi havas 24 poziciojn komenciĝantajn per 0. Ĉar kelkaj valoroj aperas implicite en la sistemo, ni devas kontroli, ĉu tiuj valoroj taŭgas por la materialo, kiun ni katalogas en ĉiu momento. Koha disponas malfaldeblajn menuojn por la modifeblaj pozicioj.

Oni devas zorge kontroli la poziciojn 06 (tipo de rikordo), 07 (bibliografia nivelo), 17 (nivelo de kodado) kaj 18 (formo de priskriba katalogado).

Ĉar en esperantaj bibliotekoj la plej abunda materialo estas teksta, la valoro en la pozicio 06 estos ofte "a" (teksta materialo). Tiu valoro enestas implicite en Koha, kiam oni malfermas novan rikordon. Se oni katalogas videon, sonregistraĵojn, partituron, ktp., oni ne forgesu ŝangi tiun valoron por la valoro taŭga en ĉiu kazo.

Jen la listo de valoroj por la pozicio **06-tipo de rikordo**:

a – Teksto

c – Partituro

d – Partituro manskribita

e – Kartografia materialo (mapoj...)

f – Kartografia materialo manskribita

g – Grafika materialo projekciebla (videoj, filmoj...)

i – Sonregistraĵo ne muzika

j – Sonregistraĵo muzika

k – Dudimensia grafika materialo ne projekciebla (afiŝoj, fotoj...)

m – Komputil-dosiero

o – Kompleto (*Kit*)

p – Miksita materialo

r – Tridimensia objekto artefarita aŭ natura

t – Teksto manskribita

En la pozicio 07 oni kudas la bibliografian nivelon, kiu respondas al la karaktero monografia aŭ seriaĵa de la materialo katalogata. Ekzemple, se oni katalogas filmon aŭ diskon, la karaktero estas ĝenerale monografia, sed se temas pri songazeto, la karaktero estas seriaĵa, ĉar simila laŭ ĝiaj trajtoj al paperaj revuoj aŭ periodaĵoj. La implicita valoro en Koha estas "m" (monografio).

¹ <https://www.loc.gov/marc/bibliographic/>

Jen la listo de valoroj por la pozicio **07-bibliografia nivelo**:

a – Monografia konsistiga parto

b – Seria konsistiga parto

c - Kolekto

d - Subunuoj

i – Integrebla risurco

m - Monografio

s – Seriaĵo

La nivelo de kodado, en pozicio 17, estu “kompleta nivelo”, reprezentita per blanko (#). La implicita valoro de Koha estas “7” (minimuma nivelo), ni devas ŝanĝi ĝin krom se ial oni deziras alian katalogan nivelon por certa tipo de materialoj.

Jen la listo de valoroj por la pozicio **17-nivelo de kodado**:

- Kompleta nivelo

1 – Kompleta nivelo, materialo ne ekzamenita

2 – Nekompleta nivelo, materialo ne ekzamenita

3 – Mallongigita nivelo

4 – Baza nivelo

5 – Parta nivelo (preliminar)

7 – Minimuma nivelo

8 – Nivelo de antaŭpublikigo

u - Nekonata

z – Ne aplikebla

Kaj fine, en la pozicio 18, la implicita valoro estas “a” (AACR 2), kiun ni devas ŝanĝi al “i” (ISBD kun interpunkcio)².

Jen la listo de valoroj por la pozicio **18- formo de priskriba katalogado**:

- Ne estas ISBD

² La valoro “c”(ISBD sen interpunkcio) povas taŭgi por tiuj sistemoj, kiuj permesas aŭtomate aldoni la interpunkcion, jen integrante ĝin en la rikordon mem, jen per surfaca tavolo, kiu montras la interpunkcion en la ekranon sen efektive aldoni ĝin al la rikordo. Momente, Koha ne havas tiun eblecon. Sed se oni katalogas per iu alia programo, kiu tion permesas, bone notu, ke la interpunkcio ligita al kelkaj subkampoj (ekzemple 245\$b) estas variebla. En tiuj kazoj, indas tajpi la varieblan interpunkcion, ĉar la sistemo ne povas per si mem distingi la konvenan interpunkcion en ĉiu kazo.

- a - AACR 2
- c - ISBD sen interpunkcio
- i - ISBD kun interpunkcio**
- n - Ne estas ISBD; sen interpunkcio
- u - Nekonata

Kontrolkampoj

001 – Kontrolnumero

Kontrolnumero asignita al la rikordo aŭtomate generita de la sistemo.

En la unuaj versioj, Koha ne kodis la kontrolnumeron en la kampo 001 de la bibliografiaj rikordoj, sed en propra kampo (biblionumber) mastrumita interne de la sistemo. Sed en la lastaj ĝisdatigoj kiu manko estas jam solvita.

003 – Identigilo de la kontrolnumero

MARC-kodo de la biblioteko aŭ kataloga centro. Kutime ĉi-kodo estas aŭtomate generita de la sistemo, se oni agordas ĝin.

Multaj bibliotekoj uzas ĉi-kampe neoficialan kodon kaj verŝajne por la plej granda parto de Esperanto-bibliotekoj tio sufiĉas³. Tamen, por gravaj biblioteko el historia kaj enhava vidpunkto, estas konsilinde peti ĝin de la koncerna agentejo: MARC Codes for Organizations⁴

Ĝi estas agordebla en Koha por ke ĝi registriĝu aŭtomate en la kampo.

005 – Dato kaj horo de la lasta modifo de la rikordo

La kampo enhavas 16 signojn kiuj indikas la daton kaj horon de la lasta modifo de la rikordo. Ĝi estas aŭtomate generita kaj ŝanĝita de la sistemo laŭbezone.

006 – Informkodoj de fiksa longeco. Karakterizaĵoj de la aldona materialo

Ĝi konsistas el 18 pozicioj (00-17), kiuj provizas koditan informon pri specialaj aspektoj de la katalogata risurco, kiuj ne povas esti koditaj en la kampo 008 (Informkodoj de fiksa longeco. Ĝenerala informo). Uzata ĉefe por kodi aspektojn rilatajn al elektronikaj risurcoj, kiam oni ne uzas la valoron “m” en 000/06 (komputila dosiero), nome, kiam ne temas pri komputila programaro (inkluzive de programoj, ludoj, tiparoj), nombraj datenoj, interretaj sistemoj aŭ servoj, ktp.

La kampo havas arbostrukturon, kie la kodo donita en 006/00 (Formo de la materialo) determinas la datenelementojn difinitajn por la sekvaj pozicioj.

³ Eblus interkonsenti pri la maniero krei la nenormigitajn kodojn de la bibliotekoj. Ekzemple, litero(j) kiu(j) identigas la urbon, streko, tri literojn, kiuj identigas la bibliotekon. Laŭ tio, ĉi kodo: V-VEG, povus identigi la bibliotekon de la Valencia Esperanto-Grupo.

⁴ <https://www.loc.gov/marc/organizations/orgshome.html>

La elementoj estas difinitaj per sia pozicio. La nedifinitaj pozicioj enhavas blankon (#). Ĉiuj difinitaj pozicioj devas enteni kodon, kiu foje povas esti pleniga signo (|), kiu signifas, ke oni ne donas prian informon, kiam la biblioteko ne deziras kodi tiun pozicion.

Kutime, oni ne uzas ĝin en rikordoj de presitaj monografioj aŭ seriaĵoj. Por la ceteraj materialoj, oni indikos en la responda parto de la *Manlibro pri katalogado* la valorojn de la uzendajn poziciojn.

Trovu pli da informo ĉi-tie: <https://www.loc.gov/marc/bibliographic/bd006.html>

007 – Fiksa kampo de fizika priskribo. Ĝenerala informo

Speciala kodita informo pri la fizikaj karakterizaĵoj de risurco. La fizikaj karakterizaĵoj ofte rilatas al la informo registrita en aliaj partoj de la MARC-rikordo, ĉefe la kampon 300 (Fizika priskribo) aŭ unu el la kampoj pri notoj (5XX).

La kampo havas arbostrukturon, kie la kodo donita en 007/00 (Speco de la materialo) determinas la datenelementojn difinitajn por la sekvaj pozicioj.

La elementoj estas difinitaj per sia pozicio kaj la nombro de pozicioj dependas de la kodo enhavata en la pozicio 00. La nedifinitaj pozicioj enhavas blankon (#). Ĉiuj difinitaj pozicioj devas enteni kodon, kiu foje povas esti pleniga signo (|) signifanta, ke oni ne donas prian informon, kiam la biblioteko ne deziras kodi tiun pozicon.

Kutime, oni ne uzas ĝin en rikordoj de presitaj monografioj aŭ seriaĵoj. Por la ceteraj materialoj, oni indikos en la responda parto de la *Manlibro pri katalogado* la valorojn de la uzendajn poziciojn.

Trovu pli da informo ĉi-tie: <https://www.loc.gov/marc/bibliographic/bd007.html>

008 – Informkodoj de fiksa longeco. Ĝenerala informo

Provizas koditan informon pri la rikordo kiel tuto kaj pri kelkaj specialaj bibliografiaj aspektoj de la katalogata risurco. Ĝi havas 40 poziciojn komenciĝantajn per 0. Kelkaj el ili estas specifaj por la diversaj tipoj de materialoj.

La elementoj estas difinitaj per sia pozicio. La nedifinitaj pozicioj enhavas blankon (#). Ĉiuj difinitaj pozicioj devas enteni kodon, kiu foje povas esti pleniga signo (|), kiu signifas, ke oni ne donas prian informon, kiam la biblioteko ne deziras kodi tiun pozicion. Tamen, ĝi ne uzeblas en la pozicioj 00-05, dato de eniro en la sistemo kaj ĝia uzado ne rekomendindas en la pozicioj 07-10 (unua dato) kaj 15-17 (eldonloko).

Komunaj pozicioj por ĉiuj materialoj

00-05 Dato de eniro en la sistemo (aŭtomate generita)

Ses signoj, laŭ la ŝablono: *jjmmtt* (jj, por la jaro; mm, por la monato; tt, por la tago)

06 Tipo de dato/stato de la eldonitaĵo

Alfabeto kodo unukaraktra. Ĝi indikas la tipon de dato donitan en la sekvaj pozicioj; por seriaĵoj, ĝi indikas ankaŭ la staton de la eldonaĵo (ĉu jam fermita aŭ daŭre publikigata). Ĝia uzo estas en rilato kun la informo aperanta en la subkampo \$c de la kampo 264. Se parto de la dato estas nekonata, tiujn ciferojn oni reprezentas per la signo *u*; por seriaĵoj daŭre publikigataj kaj por plurvolumaj eldonaĵoj daŭre publikigataj, la pozicioj 008/11-14 enhavas la kodon 9999 por indiki ke tiu dato ankoraŭ ne disponeblas. Jen la plej ofte uzataj valoroj:

c – daŭra risurco publikigata (por periodaĵoj daŭre publikigataj)

008/06 c
008/ 07-10 1908
008/11-14 9999
264 #1 \$aRoterdamo :\$bUniversala Esperanto-Asocio,\$c1908-

d – fermita publikigaĵo (por fermitaj periodaĵoj ne plu publikigataj)

008/06 d
008/ 07-10 1928
008/11-14 1941
264 #1 \$aNew York :\$bXerox Films,\$c1928-1941

m – pluraj datoj (uzata kiam plurvoluma risurco estas eldonita laŭlonge de pluraj jaroj, se ĉiuj volumoj aperas en la sama jaro oni uzas la kodon "s"). Jen ekzemploj de la plej reprezentaj kazoj:

008/06 m
008/ 07-10 1940
008/11-14 1942
264 ## \$aRoterdamo :\$bUniversala Esperanto-Asocio,\$c1940-1942
[Plurvoluma risurco aperintaj en intervalo de datoj]

008/06 m
008/ 07-10 uuuu
008/11-14 1996
264 #1 \$aRoterdamo :\$bUniversala Esperanto-Asocio,\$c-1996
[Plurvoluma risurco de kiu ne disponeblas la unua volumo]

008/06 m
008/ 07-10 2005
008/11-14 9999
264 #1 \$aRoterdamo :\$bUniversala Esperanto-Asocio,\$c2005-
[Plurparta risurco daŭre publikigata]

008/06 m
008/07-10 1998
008/11-14 9999
260 ##\$aBrescia : \$bLa scuola,\$c<c1998- >

[Plurparta risurco daŭre publikigata de kiu disponeblas nur unu meza volumo. La informo donita interkrampe estas provizora kaj povos ŝanĝiĝi kiam la risurco kompletigos.]

Kiam la dato de la unua volumo estas pli posta ol la dato de la aliaj volumoj, registru la datojn de la kampoj 008 kaj 264ŝc en kronologia ordo:

008 /06 m
008 /07-10 2006
008 /11-14 2008
264 ŝaMadrid :ŝbAnaya,ŝc2006-2008
300 ## ŝa3 volumoj
[Datoj de publikigo: v. 1, 2007; v. 2, 2006; v. 3, 2008]

q – duba dato (oni ne konas la ekzaktan daton sed eblas doni certan jar-periodon)

008/06 q
008/ 07-10 1963
008/11-14 1966
264 #1 ŝaRoterdamo :ŝbUniversala Esperanto-Asocio,ŝc[inter 1963 y 1966]

r – datoj de repres/reeldono kaj de la originalo (008/07-10 enhavas la daton de la repres aŭ reeldono; 008/11-14 enhavas la daton de la originala eldono se konata. Se nekonata, 008/11-14 enhavas la kodon u (uuuu).

008/06 r
008/ 07-10 2003
008/11-14 1985
261 #1 ŝaRoterdamo :ŝbUniversala Esperanto-Asocio,ŝc2003
534 ## ŝpReproduktaĵo de la eldono de: ŝcMadrido : HEF, 1985

s – unika dato konata/verŝajna (la dato povas esti reala, verŝajna, proksimuma aŭ deduktita; oni kodaĝin en 008/07-10; 008/11-14 enhavas blankojn (#).

008/06 s
008/ 07-10 2005
008/11-14 #####
264 #1 ŝaRoterdamo :ŝbUniversala Esperanto-Asocio,ŝc2005

Por pli detala uzo de ĉi pozicio, en kombino kun la sekvaj pridataj, vidu la koncernan sekcion de la formato⁵.

07-10 Unua dato (vidu la klarigon por la pozicio 06)

11-14 Dua dato (vidu la klarigon por la pozicio 06)

⁵ <https://www.loc.gov/marc/bibliographic/bd008a.html>

15-17 Loko de eldono, produktado aŭ fabrikado

[aa#] – alfabeto kodo dukaraktra (*Koha provizas aliron al la necesa MARC-kodaro por landoj*⁶)

18-34 Koditaj elementoj por ĉiu tipo de materialo.

Vidu sube la elementojn por la plej oftaj tipoj de materialoj en Esperanto-bibliotekoj..

35-37 Lingvo

Temas pri la ĉefa lingvo de la dokumento. Se estas pli da lingvoj kaj pli ol unu kodo estas aplikebla, oni kompletigas la informon en la kampo 041 (vidu poste).

[aaa] – alfabeto kodo trikaraktra (*Koha provizas aliron al la necesa MARC-kodaro por lingvoj*⁷)

39 Fonto de la katalogado

d – aliaj (*ĉi tiu estas la valoro uzenda de Esperanto-bibliotekoj*)

Pozicioj 18-34 specifaj por libroj

18-21 – Ilustraĵoj

Estas diversaj valoroj por la malsamaj tipoj de ilustraĵoj. Eblas uzi ĝis kvar el tiuj valoroj por detale kodi la tipojn de ilustraĵoj. Tamen, tiomagrada detaligo kutime ne penvaloras kaj oni ĝenerale uzas nur unu el tiuj du valoroj koditaj en la unua pozicio:

- Sen ilustraĵoj

La risurco ne enhavas ilustraĵojn.

a – Ilustraĵoj

La risurco enhavas ilustraĵojn sed oni ne registras la konkretajn kodojn por la diversaj tipoj de ilustraĵoj.

22 – Celata publiko

Estas pluraj kodoj, kiuj priskribas la intelektan kapablon de la celata publiko. Ĝenerale oni ne registras ĝin kaj lasas la implicitan valoron provizitan de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

23 – Formo de la eldonaĵo

Por presitaj materialoj la valoro estu ĉiam:

- Neniu el la sekvaj (neniu el la kodoj aplikeblas)

Eblas ankaŭ ne registri ĝin kaj lasi la implicitan valoron provizitan de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

Por brajlaj tekstoj uzu la kodon:

⁶ https://www.loc.gov/marc/countries/countries_code.html

⁷ https://www.loc.gov/marc/languages/language_code.html

f – Brailo

24-27 – Naturo de la enhavo

Estas diversaj valoroj por la malsamaj tipoj de enhavoj. Eblas uzi ĝis kvar el tiuj valoroj por detale kodi la naturon de la enhavo. Tamen, tiomagrada detaligo kutime ne penvaloras kaj oni ĝenerale uzas ĉi valoron koditan en la unua pozicio:

- Oni ne specifas la naturon de la enhavo.

Eblas ankaŭ ne registri ĝin kaj lasi la implicitan valoron provizitan de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

28 – Oficiala eldonaĵo

Oni indikas per kodo ĉu la eldonaĵo estas publikigita de aŭ por oficiala instanco (internacia, nacia, regiona, loka) aŭ de unu el ties dependaj organismo. Eblas tre detali la informon, tamen, la plej rekomenditaj valoroj estas:

- Ne estas oficiala eldonaĵo

o – Oficiala eldonaĵo-nivelo ne determinita

Eblas ankaŭ ne registri ĝin kaj lasi la implicitan valoron provizitan de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

29 – Kongresa eldonaĵo

Oni indikas per kodo ĉu la eldonaĵo estas prikongresa aŭ publikigita okaze de kongreso. La valoroj estas:

0 - Ne estas kongresa eldonaĵo

1 – Estas kongresa eldonaĵo

Eblas ankaŭ ne registri ĝin kaj lasi la implicitan valoron provizitan de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

30 – Omaĝoj

Ĉi pozicio indikas ĉu la risurco estas aŭ ne omaĝo, nome, gratula aŭ memora eldonaĵo ĝenerale konsistanta el kolekto de eseoj aŭ kontribuoj biografiaj aŭ sciencan. La eblaj valoroj estas:

0 – Ne estas omaĝo

1 – Estas omaĝo

Eblas ankaŭ ne registri ĝin kaj lasi la implicitan valoron provizitan de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

31 – Indekso

Ĉi pozicio indikas ĉu la risurco enhavas aŭ ne indekson. La eblaj valoroj estas:

0 – Ne enestas indekso

1 – Enestas indekso

Eblas ankaŭ ne registri ĝin kaj lasi la implicitan valoron provizitan de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

32 – Ne difinita

Lasu la implicitan valoron provizitan de la sistemo

33 – Literatura formo

Kodo, kiu identigas la literaturan formon de la verko enhavata en la risurco. Eblas elekti numerkodojn por simple indiki ĉu temas pri fikcia verko aŭ ne, aŭ detaligi per literkodoj la tipon de literaturaĵo.

0 – Ne estas fikcio

1 – Estas fikcio

d – Teatro

e – Eseo

f – Romano

h – Humoro, satiro, ktp.

l – Leteroj

j – Noveloj, rakontoj

m – Miksaĵo

p – Poezio

s – Paroladoj

u – Nekonata

Eblas ankaŭ ne registri ĝin kaj lasi la implicitan valoron provizitan de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

34 – Biografio

Ĉi pozicio indikas ĉu la risurco enhavas aŭ ne biografion. La eblaj valoroj estas:

– Ne enestas biografia materialo

a – Membiografio

b – Individua biografio (de unu persono)

c – Kolektiva biografio (biografioj de pli ol uno persono)

d – Enhavas biografian informon

Eblas ankaŭ ne registri ĝin kaj lasi la implicitan valoron provizitan de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

Pozicioj 18-34 specifaj por komputilaj dosieroj

18 -21 – Ne difinitaj

Lasu la implicitan valoron provizitan de la sistemo.

22 – Celata publiko

Estas pluraj kodoj, kiuj priskribas la intelektan kapablon de la celata publiko. Ĝenerale oni ne registras ĝin kaj lasas la implicitan valoron provizitan de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

24-25 – Ne difinitaj (enhavas blankojn (#) aŭ plenigajn signon (|))

27 – Ne difinitaj (enhavas blankon (#) aŭ plenigan signon (|))

28 – Oficiala eldonaĵo

Oni indikas per kodo ĉu la eldonaĵo estas publikigita de aŭ por oficiala instanco (internacia, nacia, regiona, loka) aŭ de unu el ties dependaj organismo. Eblas tre detaligi la informon, tamen, la plej rekomenditaj valoroj estas:

- Ne estas oficiala eldonaĵo

o – Oficiala eldonaĵo-nivelo ne determinita

Eblas ankaŭ ne registri ĝin kaj lasi la implicitan valoron provizitan de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

29-34 – Ne difinitaj (enhavas blankojn (#) aŭ plenigajn signojn (|))

Pozicioj 18-34 specifaj por seriaĵoj

18 – Periodeco

Alfabeto kodo unulitera, kiu indikas la periodecon de eldonaĵo.

- Neregula

a – Jara

b – Dumonata

c – Duonsemajna

d – Taga

e – Duonmonata

f – Duonjara

g – Dujara

h – Trijara

i – Trionsemajna

j – Trionmonata

k – Kontinue ĝisdatigita

m – Monata

q – Trimonata

s – Dusemajna

t – Kvarmonata

u - Nekonata

w – Semajna

z – Alia

| - Oni ne intencas kodi

Ĝi baziĝas sur la informo registrita en la kampo 310 (Nuna periodeco). Foje, la periodec-kodoj ne ĝuste spegulas la periodecon tiel, kiel ĝi aperas en la kampo 310. Kutime, tio okazas, kiam la periodeco estas esprimita kiel ofteco, per numeroj aperintaj en la jaro (ekzemple, 4 numeroj jare). En tiuj kazoj, oni uzas la kodon de la plej proksima periodeco laŭ la suba tabelo:

Periodeco	Aplikenda kodo
Du numeroj jare	f (duonjara)
Kvar numeroj jare	q (trimonata)
Kvin numeroj jare	q (trimonata)
Ses numeroj jare	b (dumonata)
Sep numeroj jare	b (dumonata)
Ok numeroj jare	b (dumonata)
Naŭ numeroj jare	m (monata)
Dek numeroj jare	m (monata)
Dek unu numeroj jare	m (monata)
Dekdu numeroj jare	m (monata)

19 – Reguleco

Estas pluraj kodoj, kiuj priskribas la antaŭviditan regulecon de seriaĵo. En Esperanto-bibliotekoj, sufiĉas la implicita valoro provizita de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

20 – Ne difinita.

Lasu la implicitan valoron provizitan de la sistemo.

21 – Tipo de daŭra risurco

Estas pluraj kodoj, kiuj priskribas la tipon de daŭra risurco.

- Neniu el la sekvaj

d – Ĝisdatigebla datenbanko

g – Revuo (magazine)

h – Blog

j – Akademia revuo
l – Ĝisdatigeblaj folioj
m – Monografia serio
n – Ĵurnalo
p – Revuo
r – Deponejo (repository)
s – Novaĵ-bulteno
t – Adresaro
w – Ĝisdatigebla retejo
| - Oni ne intencas kodi

En Esperanto-bibliotekoj, sufiĉas la implicita valoro provizita de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

22 – Formo de la origina eldonaĵo

En Esperanto-bibliotekoj, sufiĉas la implicita valoro provizita de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

23 – Formo de la eldonaĵo

En Esperanto-bibliotekoj, sufiĉas la implicita valoro provizita de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

24 – Naturo de la verko kiel tuto

En Esperanto-bibliotekoj, sufiĉas la implicita valoro provizita de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

25-27 – Naturo de la enhavo

En Esperanto-bibliotekoj, sufiĉas la implicita valoro provizita de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

28 – Oficiala eldonaĵo

Oni indikas per kodo ĉu la eldonaĵo estas publikigita de aŭ por oficiala instanco (internacia, nacia, regiona, loka) aŭ de unu el ties dependaj organismo. Eblas tre detaligi la informon, tamen, la plej rekomenditaj valoroj estas:

- Ne estas oficiala eldonaĵo

o – Oficiala eldonaĵo-nivelo ne determinita

Eblas ankaŭ ne registri ĝin kaj lasi la implicitan valoron provizitan de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

29 – Kongresa eldonaĵo

Oni indikas per kodo ĉu la eldonaĵo estas aŭ eldonaĵo prikongresa aŭ publikigita okaze de kongreso. La valoroj estas:

- 0 - Ne estas kongresa eldonaĵo
- 1 – Estas kongresa eldonaĵo

Eblas ankaŭ ne registri ĝin kaj lasi la implicitan valoron provizitan de la sistemo:

- | - Oni ne intencas kodi

30-32 – Ne difinitaj

Lasu la implicitajn valorojn provizitajn de la sistemo.

33 – Originala alfabeto aŭ skribo de la titolo

Estas pluraj kodoj, kiuj priskribas la originalan alfabeton aŭ skribon de la titolo. En Esperanto-bibliotekoj, sufiĉas la implicita valoro provizita de la sistemo:

- | - Oni ne intencas kodi

34 – Konvencio de eniro

Oni indikas per kodo ĉu la eldonaĵon oni katalogas laŭ la konvencio de sinsekva eniro, lasta eniro aŭ lasta aŭ integrita eniro.

0 – Sinsekva eniro (Oni kreas novan rikordon kiam: 1) ŝanĝiĝas la titolo, aŭ 2) ŝanĝiĝas la respondeca korporacio uzita por krei la preferatan titolon. La antaŭajn aŭ postaj titolojn oni registras en interliga kampo (780/785) de ĉiu rikordo). Ĝi estas la uzenda valoro en Esperanto-bibliotekoj uzantaj RDA, AACR kaj aliaj katalogaj regularoj bazitaj sur ĉi lasta. Ĝi estas la valoro implicate provizita de Koha.

1 – Lasta eniro (Oni katalogas la eldonaĵon laŭ ĝia plej lasta titolo aŭ respondeca korporacio. Antaŭajn titolojn kaj korporaciojn oni registras per notoj (247, 547 kaj 550). Uzenda se oni katalogas per katalogaj regularoj antaŭaj al AACR.

2 – Integrita eniro (Oni katalogas la eldonaĵon laŭ ĝia plej lasta titolo aŭ respondeca korporacio. Ĝi estas uzenda en la kazo de integreblaj risurcoj kaj elektronikaj periodaĵoj, kiuj ne konservas siajn antaŭajn titolojn).

- | - Oni ne intencas kodi

Pozicioj 18-34 specifaj por muziko

Jen la ĉefaj rekomendataj valoroj en ĉiu pozicio por Esperanto-bibliotekoj. Vidu la kompletajn kodarojn ĉi-tie: <https://www.loc.gov/marc/bibliographic/bd008m.html>

18-19 – Formo de la komponaĵo

Alfabeto kodo dulitera, kiu indikas la formon de la komponaĵo. Ekzemple (la listo esta pli longa):

- bd – Baladoj
- ch – Korusaj kantoj

fm – Folk-muziko

hy – Himnoj

jz – Jazo

mu – Pluraj formoj

nn – Ne aplikebla (uzata por nemuzikaj sonregistraĵoj)

rc – Rok-muziko

sg – Kantoj

En Esperanto-bibliotekoj, sufiĉas la implicita valoro provizita de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

20 – Formato de la muziko

Alfabeto kodo unulitera, kiu indikas la formaton de la muziko.

En Esperanto-bibliotekoj, sufiĉas la implicita valoro provizita de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

21 – Muzikaj partoj

Kodo unukaraktra, kiu indikas ĉu la katalogata risurco enhavas partojn.

En Esperanto-bibliotekoj, sufiĉas la implicita valoro provizita de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

22 – Adresata publiko

Alfabeto kodo unulitera, kiu indikas la intelektan nivelon de la publiko al kiu estas adresata la risurco.

En Esperanto-bibliotekoj, sufiĉas la implicita valoro provizita de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

23 – Formo de la eldonaĵo

Alfabeto kodo unulitera, kiu indikas la formon de la materialo

En Esperanto-bibliotekoj, sufiĉas la implicita valoro provizita de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

24-29 – Aldona materialo

Ĝis ses alfabetaj kodoj unuliteraj (registritaj en alfabeto ordo), kiu indikas la aldonan materialon de sonregistraĵoj kaj partituroj. Se oni registras malpli ol ses kodojn, oni ĝustigas je la maldekstro kaj la ne uzatajn poziciojn oni kompletigas per blankoj. Ĝenerale, oni uzas nur unu specifan kodon por la plej signifa parto de la aldonata materialo.

En Esperanto-bibliotekoj, sufiĉas la implicita valoro provizita de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

30-31 – Parolataj tekstoj en sonregistraĵoj

Ĝis du kodoj unukarakteraj, kiuj indikas la tipon de teksto enhavata de nemuzika sonregistraĵo. Se oni registras nur unu kodon, oni ĝustigas ke la dekstro kaj kompletigas per blankoj la ne uzatan pozicion.

En Esperanto-bibliotekoj, sufiĉas la implicita valoro provizita de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

32 – Ne difinita (enhavas blankon (#) aŭ plenigan signon (|))

33 – Transponado kaj aranĝo

Kodo, kiu indikas ĉu la katalogata risurco aŭ parto de ĝi estas la rezulto de la transponado aŭ aranĝo de alia verko.

En Esperanto-bibliotekoj, sufiĉas la implicita valoro provizita de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

34 – Ne difinita (enhavas blankon (#) aŭ plenigan signon (|))

Pozicioj 18-34 specifaj por vidaj materialoj

Jen la ĉefaj rekomendataj valoroj en ĉiu pozicio por Esperanto-bibliotekoj. Vidu la kompletajn kodarojn ĉi-tie: <https://www.loc.gov/marc/bibliographic/bd008v.html>

18-20 – Tempodaŭro de filmoj kaj videoregistraĵoj

Tri cifera numero, kiu indikas la totalan tempodaŭron de filmo aŭ videoregistraĵo. Oni ĝustigas la numeron je la dekstro kaj kompletigas per nuloj la ne uzatajn poziciojn.

En Esperanto-bibliotekoj, sufiĉas la implicita valoro provizita de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

21 – Ne difinita (enhavas blankon (#) aŭ plenigan signon (|))

22 – Adresata publiko

Alfabeto kodo unulitera, kiu indikas la publikon al kiu la risurco estas adresata.

En Esperanto-bibliotekoj, sufiĉas la implicita valoro provizita de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

23-27 – Ne difinitaj (enhavas blankojn (#) aŭ plenigajn signojn (|))

28 – Oficiala eldonaĵo

Oni indikas per kodo ĉu la eldonaĵo estas publikigita de aŭ por oficiala instanco (internacia, nacia, regiona, loka) aŭ de unu el ties dependaj organismo. Eblas tre detali la informon, tamen, la plej rekomenditaj valoroj estas:

- Ne estas oficiala eldonaĵo

o – Oficiala eldonaĵo-nivelo ne determinita

Eblas ankaŭ ne registri ĝin kaj lasi la implicitan valoron provizitan de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

29 – Formo de la eldonaĵo

En Esperanto-bibliotekoj, sufiĉas la implicita valoro provizita de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

30-32 – Ne difinitaj (enhavas blankojn (#) aŭ plenigajn signojn (|))

33 – Tipo de vida materialo

En Esperanto-bibliotekoj, sufiĉas la implicita valoro provizita de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

34 – Tekniko

En Esperanto-bibliotekoj, sufiĉas la implicita valoro provizita de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodi

Kampoj pri numeroj kaj kodoj

020 – ISBN (International Standard Book Number = Internacia Norma Libro-Numero) (R⁸).

Numero asignita al monografia eldonaĵo de la responda landa agentejo⁹. Ĝi kreiĝis en 1970 kiel unika identigilo por libroj.

La numero povas konsisti el dek ciferoj (la plej malnovaj), aŭ el dek tri ciferoj (ekde 2007). La 10-ciferan numeron konstituas kvar grupoj disigitaj per streko (la lasta cifero estas kontrolnumero por aŭtomata validigo); la unua grupo identigas la landon aŭ la lingvon, la duan identigas la eldonejon, kaj la trian la konkretan eldonon de iu titolo. La 13-ciferan numeron konstituas kvin grupoj, el kiuj la unua estas EAN¹⁰-prefikso, kiu identigas la libro-industrion; la cetero funkcias same kiel en la 10-cefera numero.

La kampo povas enhavi nevalidajn numerojn kaj ankaŭ indiki al kiu parto de la eldonaĵo la numero apartenas. Ĝi estas ripetebla por la pluraj numeroj asociitaj al iu risurco.

Indikiloj:

1a nedifinita (*entenas blankon #*)

2a nedifinita (*entenas blankon #*)

Ĉefaj subkampoj:

ŝa **ISBN (NR)**

ŝq **Aldona informo (R)**

⁸ N aŭ NR indikas ĉu la subkampo estas ripetebla (R) aŭ ne ripetebla (NR).

⁹ *International ISBN Agency* (Internacia ISBN-Agentejo): <https://www.isbn-international.org/esp/index.html>

¹⁰ Internacia Varnumero (origine Eŭropa Varnumero aŭ en angla *European Article Number*, sed nuntempe renomita *International Article Number*, kvankam oni pluhavas la mallongigon EAN).

Ŝz Nevalida aŭ nuligita numero (R)

020 ## Ŝa84-7635-597-1

020 ## Ŝa978-84-6523-841-0ŝq(kompleta verko)

020 ## Ŝa978-84-6523-842-Xŝq(volumo 1)

020 ## Ŝa978-84-6523-594-0ŝz978-84-6532-594-0

[La numero aperanta en la risurco estas erara kaj eblis trovi la ĝustan per aliaj rimedoj]

022 – ISSN (International Standard Serial Number = Internacia Norma Numero por Seriaĵoj)(R)

La ISSN, Internacia Norma Numero por Seriaĵoj, estas la internacia kodo por identigi gazetojn, ĵurnalojn, bultenojn, kaj aliajn tipojn de seriaj eldonaĵoj.

Por la mastrumado de la normo kreiĝis en 1976 la Internacia Centro por la Registrado de Seriaj Eldonaĵoj ankaŭ konata kiel Internacia ISSN-Centro. Pri la aplikado de la normo en la mondo respondecas la diversaj naciaj ISSN-Centroj, kiuj konstituas la ISSN-Reton.

La numero konsistas el 8 ciferoj en du grupoj de 4, disigitaj per streko, el kiuj la lasta estas kontrolnumero. La ciferoj havas nenian plian signifon ol la nura identigo de la seria eldonaĵo: ne estas kodoj por identigi la landon aŭ la eldoniston.

La ISSN estas ligita al la titolo de la eldonaĵo kaj ŝanĝo en la titolo povus implici ŝanĝon de ISSN. Dum ne estas ŝanĝoj en la titolo, la ISSN restas sama kaj ĝi devas aperi en ĉiuj numeroj de la eldonaĵo. La sama titolo en malsama formato postulas malsaman numeron. La sama titolo en malsamaj lingvoj, ankaŭ.

La kampo povas enhavi nevalidajn numerojn.

Indikiloj:

1a nivelo de internacia intereso

- Oni ne specifas la nivelon. Uzenda de bibliotekoj.

0 – Daŭra risurco de internacia intereso. (Uzata nur de ISSN-centroj)

1 – Daŭra risurco sen internacia intereso. (Uzata nur de ISSN-centroj)

2a nedifinita (*entenas blankon #*)

Ĉefaj subkampoj:

Ŝa ISSN (NR)

Ŝy Nevalida numero (R)

Ŝz Nuligita numero (R)

022 ## Ŝa1937-3325

024 – Aliaj normigitaj identigiloj (R)

Normigita numero aŭ kodo publikigita en risurco, kiu ne povas esti inkludita en alia kampo (ekzemple: 020, Internacia Norma Libronumero, aŭ 022, Internacia Norma Numero por Seriaĵoj). Oni identigas la tipon de normigita numero aŭ kodo jen per la unua indikilo, jen per la subkampo \$2 (Fonto de la kodo aŭ numero).

Indikiloj:

- 1a Tipo de normigita numero aŭ kodo
- 0 – Internacia Norma Kodo por Registraĵoj (*International Standard Recording Code, ISRC*)
 - 1 – Universala Kodo de Produkto (*Universal Product Code, UPC*)
 - 2 – Internacia Norma Muziknumero (*International Standard Music Number, ISMN*)
 - 3 – Internacia Artikolnumero (*International Article Number*)
 - 4 – Identigilo de Seriaĵnumero kaj Kontribuaĵo (*Serial Item and Contribution Identifier, SICI*)
 - 7 – Fonto specifita en subkampo \$2
 - 8 – Nespecifita tipo de norma numero aŭ kodo
- 2a Indikilo de la diferenco (indikas ĉu ekzistas diferenco inter skanita numero aŭ kodo kaj la sama numero aŭ kodo en okullegebla formo).
- # - Oni ne provizas informon**
- 1 – Ne estas diferenco
 - 2 – Estas diferenco

En esperantaj bibliotekoj, sufiĉas la valoro #.

Ĉefaj subkampoj:

\$a Normigita numero aŭ kodo (NR)

024 1# \$a7822183031

024 2# \$aM011234564

\$q Aldona informo (R)

024 2# \$aM570406203 \$qpartituro

024 2# \$aM570406210 \$qpartoj

\$z Nuligita aŭ ne valida numero (R)

La subkampo \$z povas aperi kiel la sola subkampo de la kampo 024 se la valida numero aŭ kodo estas nekonata.

024 1# \$z5539143515

§2 **Fonto de la normigita numero aŭ kodo**

MARC-kodo, kiu identigas la fonton de la numero aŭ kodo. Uzata nur kiam la valoro de la unua indikilo estas 7. La kodojn oni prenas el la listo: *Standard Identifier Source Codes*¹¹.

024 7# \$a0A3200912B4A1057\$2istc

028 – Numero por eldonanto aŭ distribuanto (R)

Strukturita numero por eldonanto aŭ distribuanto uzata por sonregistraĵoj, videoregistraĵoj, presita muziko kaj aliaj muzikrilataj materialoj. Nestrukturitaj eldonintaj numeroj inkludindaj en la bibliografia rikordo estu registritaj en kampo 500 (Ĝenerala Noto).

Indikiloj:

1a Tipo de numero

0 – Numero de eldonaĵo

Numero asignita de eldoninto al sonregistraĵo, flanko de sonregistraĵo, aŭ interpretado surbaze de sonregistraĵo, aŭ al la tuto de sonregistraĵoj publikigitaj kiel tutaĵo por identigi la konkretan eldonon. La numero de eldonaĵo aperas en la disk-etikedo de la sonregistraĵo aŭ en la ujo se temas pri aro da ili.

028 01 \$aSTMA 8007\$bTamlamotown

1 – Numero de matrico

Numero de la matrico aŭ ĉefregistraĵo el kiu la sonregistraĵo estis farita. Oni uzas ĝin kiel identiga numero kiam la risurco ne havas numeron de eldonaĵo aŭ muzikeldonejon.

2 – Numero de plato

Asignita de la eldoninto al specifa muzikeldonaĵo

3 – Alia numero de muzikeldonanto

Temas pri numero, kiu estas nek la numero de eldonaĵo, nek la numero de matrico, nek la numero de plato.

4 – Numero de la eldoninto de videoregistraĵo

5 – Alia numero de eldoninto

Alia ol la antaŭaj difinitaj valoroj

6 – Numero de distribuanto

¹¹ <https://www.loc.gov/standards/sourcelist/standard-identifier.html>

Numero asignita de distribuinto al specifa muzika aŭ muzikrilata eldonaĵo aŭ al specifa videoregistraĵo. Se vi dubas ĉu la numero estas de la eldoninto aŭ la distribuinto, registru ĝin kiel numero de eldoninto.

2a Kontrolo de aldona noto/alirpunkto

0 – Sen noto, sen alirpunkto

1 – Kun noto kaj alirpunkto

2 – Noto, sen alirpunkto

3 – Sen noto, kun alirpunkto

Ĉefaj subkampoj:

\$a *Numero de eldonanto aŭ distribuanto (NR)*

028 00 \$aGV-201A\$bGood Vibrations Records

[Numero de eldonaĵo]

028 11 \$aL27410X\$bChaparral

[Numero de matrico]

028 40 \$aVA5386\$bVestron Video

[Numero de plato]

\$b *Fonto (NR)*

Nomo de la eldonanto aŭ distribuanto.

028 02\$aPJC 222013\$bParis Jazz Corner Productions

028 62\$aHM 76\$bHarmonia Mundi

[Sonregistraĵo eldonita de Paris Jazz Corner Productions kaj distribuita de Harmonia Mundi]

028 42\$aK0904\$bKartemquin Films

028 62\$aDV98597\$bFacets Multimedia

[Videoregistraĵo eldonita de Kartemquin Films kaj distribuita de Facets Multimedia]

\$q *Aldona informo (R)*

028 02 \$a438 953-2\$bPhilips Classics\$q(kompleto)

028 02 \$a438 954-2\$bPhilips Classics\$q(disko 1)

028 02 \$a438 955-2\$bPhilips Classics\$q(disko 2)

[2 K-disko, kun numero por la tuto kaj numero por ĉiu aparta k-disko]

028 02 \$aK2 31158\$bEMI Music Canada\$q(en la etikedo)

028 02 \$a7234 8 31158\$bEMI Music Canada\$q(en la spino de la ujo)

[K-disko kun du malsamaj numeroj, unu en la etikedo kaj alia en la spino de la ujo]

040 – Fonto de la katalogado (NR)

MARC-kodo aŭ nomo de la organizo kiu kreis la rikordon, transskribis ĝin en formato legebla per komputilo aŭ modifis la ekzistantan MARC-rikordon (krom se oni aldonis nur datenojn pri la ekzempleroj). La datenoj de ĉi kampo kaj la kodo 008/39 (Fonto de la katalogado) identigas la centron respondecan pri la bibliografia rikordo. Vidu: MARC Codes for Organizations¹². (Vidu ankaŭ la aneksaĵon pri Z39.50).

Indikiloj:

Nedifinitaj, ambaŭ entenas blankon (#)

Subkampoj:

ŝa *Origina kataloga centro*

Kodo aŭ nomo de la centro, kiu kreis la originan rikordon.

ŝb *Lingvo de katalogado.*

La uzata lingvo por la registrado de tiuj datenoj, kiujn oni ne transskribas el la risurco (notoj, fizika priskribo, aldonaj klarigoj), nome, la lingvo de la katalogo (*kodo prenita de la responda MARC-kodaro*¹³)

ŝc *Transskribinta centro*

Kkodo aŭ nomo de la centro, kiu transskribis ĝin en formato legebla per komputilo, kiu povas esti la sama aŭ alia ol tiu registrita en ŝa.

ŝd *Modifinta centro*

Kodo aŭ nomo de la centro, kiu modifis la rikordon; oni ne konsideras modifon la nuran aldonon de informo pri ekzempleroj; se estas pluraj sinsekvaj modifoj far malsamaj katalogaj centroj, la kodo de ĉiu centro iras en malsama ŝd sed oni ne ripetas la subkampon se la sama kodo aŭ nomo aperus en apudaj ŝd-subkampoj.

ŝe *Priskriba normaro*

MARC-kodo aŭ nomo de la kataloga regularo uzata por krei la rikordon.

008/39 d (*alia biblioteko aŭ kataloga agentejo malsama de nacia biblioteko aŭ kataloga kunlabora programo*)

040 ## ŝaES-MaBJRŝbepoŝcES-MaBJRŝerda

[rikordo kreita kaj transskribita de Biblioteko Juan Régulo Pérez, en Esperanto, per RDA]

008/39 # (*iu nacia biblioteko*)

040 ## ŝaSpMaBNŝbspaŝcSpMaBNŝdES-MaBJRŝerda

¹² <https://www.loc.gov/marc/organizations/org-search.php>

¹³ https://www.loc.gov/marc/languages/language_code.html

[rikordo kreita kaj transskribita de la Nacia Biblioteko de Hispanio, en la hispana kaj modifita de Biblioteko Juan Régulo Pérez por adapti ĝin al sia katalogo].

041 – Lingvokodo (R)

En la kampo 041 oni registras la kodojn de la lingvoj asociitaj al iu risurco, kiam la indiko en 008/35-37 ne sufiĉas por doni kompletan informon. Oni povas ankaŭ registri la lingvon en la 546 en formo de noto.

La kampo 041 uzatas, do, kune kun 008/35-37. La kodon registritan en 008/35-37 oni indikas ankaŭ en 041 en la unua subkampo \$a.

La kampon 041 oni uzas kiam ekzistas unu aŭ pli el la sekvaj kondiĉoj:

- La risurco enhavas pli ol unu lingvo.
- La risurco estas traduko aŭ enhavas ĝin.
- La lingvo de la resumoj aŭ akompana materialo kaj la ĉefa risurco malsamas.

La kampo 041 utilas ankaŭ por indiki la originalan lingvon de la verko, aŭ tiu de la meza traduko.

En plurlingvaj risurcoj, la kodojn oni registras laŭ ordo de graveco (ĝenerale identigita per la amplekso) ene de ĝi. Se neniu lingvo elstaras super la aliaj, oni kudas ilin laŭ alfabeto kod-ordo. Se la kataloga centro elektis la kodon *mul* por 008/035-37, en la kampo 041, krom la kodon *mul*, oni indikas la kodon por la titolo (aŭ la unua titolo se estas pli ol unu). Eblas ripeti la subkampon \$a por inkludi ĉiujn lingvokodojn, sed kutime, kiam estas pli ol ses oni uzas la kodon *mul*.

Indikiloj:

1a: Indiko pri traduko

- oni ne donas informon

0 - La risurco ne estas traduko kaj ne enhavas ĝin

1 - La risurco estas traduko aŭ enhavas ĝin

2a: Fonto de la kodo

- **MARC-kodo pri lingvo** (*ĉi tiu estas la valoro uzenda de Esperanto-bibliotekoj*)

7 – Fonto indikita en la subkampo \$2 (*se ne temas pri MARC-kodo*)

Subkampoj

\$a *Lingvokodo de la teksto/sonregistraĵo aŭ sendependa titolo (R)*

\$b *Lingvokodo de la resumo (R)*

\$d *Lingvokodo de la kantata aŭ parolata teksto (R)*

\$e *Lingvokodo de la libreto (R)*

\$f *Lingvokodo de la enhavotabelo (R) (se ĝi malsimilas de tiu kodita en \$a)*

- \$g** *Lingvokodo de la aldona materialo se ne temas prilibretoj (R)*
- \$h** *Lingvokodo de la originala lingvo (R)*
- \$j** *Lingvokodo de la titolaldonoj (R)*
- \$k** *lingvokodo de la mezaj tradukoj (R)*
- \$m** *Lingvokodo de la originala aldona materialo se ne temas pri libretoj (R)*
- \$n** *Lingvokodo de la originala libreto (R)*
- \$2** *Fonto de la kodo (NR)*

La plej uzataj subkampoj estas **\$a**, **\$b**, **\$h** kaj **\$k**.

008/35-37 eng
041 ## \$aeng\$aepo\$afre
<i>[La risurco estas en la angla, Esperanto kaj la franca, sed oni ne indikas ĉu ĝi estas aŭ enestas en ĝi traduko]</i>
008/35-37 epo
041 0# \$aepo\$aspa
<i>[La risurco estas en Esperanto kaj la hispana, ne enestas traduko]</i>
008/35-37 epo
041 1# \$aepo\$hrus
<i>[La risurco estas en Esperanto, tradukita el la rusa, kiu estas la originala lingvo]</i>
008/35-37 epo
041 0# \$aepo\$aeng
<i>[La risurco estas en Esperanto kaj la angla, ne estas traduko]</i>
008/35-37 spa
041 1# \$aspa\$beng\$hepo
<i>[La risurco estas en la hispana, kun resumo en la angla, tradukita el Esperanto, kiu estas la originala lingvo]</i>
008/35-37 mul
041 0# \$amul\$aepo
<i>[La risurco estas en pluraj lingvoj sed neniu el ili elstaras, la titolo estas en Esperanto]</i>

008/35-37 **epo**

041 1# \$a**epo**\$hrus\$kgger

[La risurco estas esperanta traduko de germanlingva teksto originale publikigita en la rusa]

008/35-37 **epo**

041 1# \$a**epo**\$aspa\$hspa

[La risurco enhavas esperantan tradukon de originala hispanlingva teksto inkludita ankaŭ en la eldonaĵo]

Kampoj rilataj al la bibliografia priskribo

240 – Unuforma titolo (NR)

En ĉi kampo oni registras la preferatan titolon de verko, kiam la ĉefa alirpunkto estas nomo de persono (100), de korporacio (110) aŭ de kongreso (111).

Malgraŭ tio, ke temas pri preferataj titoloj, la mastrumsistemoj ĝenerale ne kontrolas ilin. Ankaŭ ne Koha. Cetere, temas pri, ni diru, “tranĉita” aŭtoritato. En la datenbanko oni kreas la aŭtoritaton kompleta, sed en la bibliografia rikordo oni ĉerpas nur la parton de la aŭtoro. Ĉiel ajn, la parto de la titolo devas esti laŭregule kreita en la bibliografia rikordo, sendepende de tio, ĉu oni kreis la aŭtoritaton aŭ ne.

Indikiloj:

1a: Printado aŭ vidigo

0 – Oni ne printas nek vidigas ĝin

1 – Oni printas aŭ vidigas ĝin (uzenda ĉiam)

100 1# \$aAbout, Edmond

240 10 \$aRoi des montagnes.\$lEsperanto

2a: Signoj ne alfabetigendaj (vidu pli detalan klarigon en [kampo 245](#))

0-9 - Nombro de signoj nealfabetigendaj

100 1# \$aAivanhov, Omraam Mikhaël

240 13 \$aLe yoga de la nutrition. Esperanto

Ĉefaj subkampoj

\$a – Unuforma titolo (NR)

100 1# \$aAuld, William

240 13 \$aLa fenomeno Esperanto

\$k – Forma subdivido (NR)

100 1# \$aGoethe, Johann Wolfgang von

240 10 \$alphigenie auf Tauris.\$kElektaĵo

\$l – Lingvo de la verko (NR)

100 1# \$aBalzac, Honoré de

240 10 \$aEugénie Grandet.\$lEsperanto

\$n – Numero de la parto aŭ sekcio de verko (R)

100 0# \$aHomero

240 10 \$aOdiseado.\$nKanto 1

\$p – Nomo de la parto aŭ sekcio de verko (R)

100 1# \$a Asensio, Elena

240 10 \$aCatalogación.\$pPartituras

243 – Kolektiva unuforma titolo (NR)

En ĉi kampo oni registras la preferatan kolektivan titolon de verko, kiam la ĉefa alirpunkto estas nomo de persono (100), de korporacio (110) aŭ de kongreso (111).

Malgraŭ tio, ke temas pri preferataj titoloj, la mastrumsistemoj ĝenerale ne kontrolas ilin. Ankaŭ ne Koha. Cetere, temas pri, ni diru, “tranĉita” aŭtoritato. En la datenbanko oni kreas la aŭtoritaton kompleta, sed en la bibliografia rikordo oni ĉerpas nur la parton de la aŭtoro. Ĉiel ajn, la parto de la titolo devas esti laŭregule kreita en la bibliografia rikordo, sendepende de tio, ĉu oni kreis la aŭtoritaton aŭ ne.

Indikiloj:

1a: Printado aŭ vidigo

0 – Oni ne printas nek vidigas ĝin

1 – Oni printas aŭ vidigas ĝin (uzenda ĉiam)

100 1# \$aGarcía Lorca, Federico

243 10 \$aPoezio.\$lEsperanto

2a: Signoj ne alfabetigendaj (vidu pli detalan klarigon en [kampo 245](#))

0-9 - Nombro de signoj nealfabetigendaj

100 1# \$aAïvanhov, Omraam Mikhaël

243 10 \$aVerkaro.\$lEsperanto

Ĉefaj subkampoj

\$a – Unuforma titolo (NR)

100 1# \$aZamenhof, L. L.

243 10 \$aVerkaro

\$k – Forma subdivido (NR)

100 1# \$aGoethe, Johann Wolfgang von

243 10 \$aPoezio.\$kElektaĵo

\$l – Lingvo de la verko (NR)

100 1# \$aSchiller, Friedrich

243 10 \$aPoezio.\$kElektajo.\$lEsperanto

245 – Mencio pri titolo kaj mencio pri respondeco (NR)

Ĉi kampo respondas al la *areo pri titolo kaj mencio pri respondeco* de la bibliografia priskribo de risurco, laŭ ISBD-terminologio; kaj al la atributoj de manifestiĝo *titolo kaj mencio pri respondeco* laŭ RDA-terminologio.

La kampo konsistas el la ĉeftitolo de la risurco, resto de la titolo kaj mencio pri respondeco, kaj, en malnovaj rikordoj, ĝi ankaŭ povas enhavi informon pri la tipo de materialo¹⁴.

La ĉeftitolo estas la titolo propra de risurco, nome, la titolo en la formo, kiun ĝi havas en la ĉefa fonto de informo. La ĉeftitolo povas inkludi alternativajn titolojn, numeron de la parto kaj nomon de la parto, sed ne paralelajn titolojn aŭ titolaldonojn.

Indikiloj:

1a: Aldona alirpunkto de titolo

0 - Ne estas aldona alirpunkto [*Oni uzas ĝin kiam ne estas alirpunkto 1XX, t.e., kiam la ĉefa alirpunkto estas la ĉeftitolo*]

245 00 \$aDonkiĥoto parolas Esperanton

245 00 \$aKonciza historio de la ĉina Esperanto-movado

1 - Estas aldona alirpunkto [*Oni uzas ĝin kiam estas alirpunkto 1XX*]

100 1 \$aAuld, William

245 10 \$aPaŝoj al plena posedo

2a: Signoj nealfabetigendaj

0 - Ne estas nealfabetigendaj signoj

245 00 \$aSanga nupto

1-9 - Nombro de signoj nealfabetigendaj [*La titolo komenciĝas per artikolo, kiun oni ne prikonsideras por la alfabetigo de la titolo. Kiu ajn diakritaĵo, spaco aŭ interpunkcia signo antaŭantaj la artikolon ankaŭ estas konsiderataj kiel ne alfabetigenda; tamen la samaj signoj antaŭantaj la unuan alfabetigenda signo ne estas konsiderataj ne alfabetigendaj signoj*]

245 13 \$aLa familio de Pascual Duarte

[*Alfabetigado de la titolo devas esti per "familio", do, la sistemo ne prikonsideru la tri unuajn signojn, la artikolon plus la intervortan spacon: La#, tial la 2a indikilo estas 3*]

245 00 \$a¿Qué es el esperanto?

[*La sistemo ne enkalkulas la demandosignon antaŭ la unua vorto de la titolo, do, ĉar ne estas artikolo, la valoro bezonata por la dua indikilo estas 0*]

¹⁴ En RDA tiu subkampo estas anstataŭita de aliaj kampoj, kiuj ebligas pli ampleksan detaligon pri la tipo de materialo: Tipo de enhavo (336), Tipo de medio (337), Tipo de portilo (338). Vidu ilin sube.

245 00 \$a"Edinburgh" Esperanto pocket dictionary

[Simile al la antaŭa kazo, sed...]

245 05 \$aThe "Edinburgh" Esperanto pocket dictionary

[... ĉar estas artikolo ne alfabetigenda, oni devas averti al la sistemo pri tiuj pliaj signoj nealfabetigendaj antaŭ Edinburgh: the#", entute kvin signoj]

Ĉefaj subkampoj

\$a Ĉeftitolo (NR)

En la subkampo \$a oni registras la ĉeftitolon, escepte de la numero kaj/aŭ nomo de la parto, kaj la alternativan titolon. La subkampo \$a ankaŭ povas enhavi la unuan titolon de risurco konsistanta el aro de verkoj sen kolektiva titolo.

Ĝi enhavas ĉiun titolan informon ĝis la unua interpunkcia signo kaj inkluzivas ĝin: egalsigno (=), dupunkto (:), klinita streko (/), punktokomo (;), punkto (.), aŭ komo (,).

245 00 \$a Premiitaj tezoj

245 10 \$a Maja nokto aŭ La dronintino

245 13 \$a La divina commedia =\$b

245 13 \$a La infana raso :\$b

245 10 \$a Du junaj fraŭlinoj ;\$b

245 10 \$a Verkaro de V. N. Devjatnin (rusa esperantisto)\$. \$n

245 10 \$a Merlo sub menhiro /\$c

\$b Resto de titolo (NR)

Temas pri kompleksa subkampo, kiu povas enhavi plej diversajn tipojn de informo. Ĝi povas inkludi paralelajn titolojn, titolojn sekvantajn la unuan (en risurcoj sen kolektiva titolo) kaj titolaldonojn. Ĝi enhavas ĉiujn datenojn, kiuj sekvas la unuan interpunkcian signon (koditan en la antaŭa subkampo), ĝis la signo kiu enkondukas la mencion pri respondeco (/).

La subkampo \$b estas ne ripetebla, tio estas, oni ne ripetas ĝin kiam en la kampo estas pli ol unu paralela titolo, alia(j) titolo (j) kaj/aŭ pli ol unu titolaldono.

245 13 \$a La divina commedia =\$b La dia komedio /\$c...

245 10 \$a Du junaj fraŭlinoj ;\$b kaj Korneliino : du noveloj el la bonekzemplaj /\$c...

245 13 \$a La orelingo :\$b bajnaĵo ; Ŝimstatoj : poemoj /\$c...

245 10 \$a Saturno :\$b poemoj bilingvies = dulingvaj poemoj /\$c...

245 10 \$a Enkonduko en la teorion de lingvaj ludoj :\$b ĉu mi lernu esperanton? = Einführung in die Theorie sprachlicher Spiele : soll ich Esperanto lernen? /\$c...

\$c Mencio pri respondeco, ktp. (NR)

Plia ne ripetebla subkampo. Ĝi povas enhavi la unuan mencion pri respondeco kaj/aŭ ceterajn informojn rilatajn al la kampo 245 ne kodeblaj en la aliaj subkampoj. La subkampo ĉc inkludas ĉiujn datenojn, kiuj sekvas la klinitan strekon (/). Ĉi subkampo ĉiam estas la lasta kaj ne eblas kodi iun ajn alian subkampon post ĝi.

245 10 \$aSur la spuroj de Federico García Lorca /\$cMiguel Fernández
 245 13 \$aLa tempesto /\$cWilliam Shakespeare ; tradukis K. Kalocsay
 245 10 \$aElementa kurso pri astronomio /\$cDavid Galadí-Enríquez kaj Amri Wandel
 245 10 \$aVetero kaj klimato de la mondo /\$cDenis Riley, Lewis Spolton ; el la angla tradukis Kris Long
 245 14\$aThe analysis of the law /\$cSir Matthew Hale. The students companion / Giles Jacob

\$n *Numero de la parto aŭ sekcio de la verko (R)*

La numerado estas difinita kiel indiko de sinsekvo en kiu ajn formo, ekzemple: Parto 1, Suplemento, Dua libro. La subkampon \$n antaŭas punkto (.), krom se la antaŭa vorto de la antaŭ subkampo estas mallongigo aŭ dateno finiĝantaj mem per punkto.

245 10 \$aOdiseado.\$nKanto I
 245 10 \$aNeforgeseblaj tagoj.\$nDua parto
 245 10 \$aRakontoj, ktp.\$nKajero 3
 [La punkto antaŭ \$n ne estas ISBD-interpunkcio, sed parto de la mallongigo kodita en la antaŭa subkampo]

\$p *Nomo de parto aŭ sekcio de verko (R)*

Nomo de parto aŭ sekcio de verko en. La subkampon \$p antaŭas punkto (.) se ĝi iras post la subkampoj \$a, \$b aŭ alia subkampo \$p; la subkampon \$p antaŭas komo (,) se ĝi iras post subkampo \$n.

245 10 \$aEtimologia vortareto pragmata de Esperanto.\$pSuplemento
 245 10 \$aKonkordanco al la Krestomatio.\$nUnua parto,\$pLa participoj
 245 13\$aLa genia kavaliro Don-Kiĥoto de Manĉujo.\$n(Unua parto).\$nĈapitro XXIIa,\$pPri la libero, kun Don-Kiĥoto donis al multaj malfeliĉuloj, kiujn oni malvolonte portis, kien ili ne volus iri

246 – Titolvarianto (R)

Titolvariantoj, kiuj aperas en malsamaj partoj de risurco aŭ kiel parto de la ĉeftitolo. Aŭ kiel alternativa formo de titolo kiam ĝi esence malsamas de la mencio pri titolo registrita en la kampo 245 kaj krome kontribuas al pli bona identigo de la risurco.

Por risurcoj sen kolektiva titolo enhavantaj plurajn verkojn, oni uzas la kampon 246 nur por titolvariantoj de la titolo elektita kiel ĉeftitolo, kiu ĝenerale estas tiu, kiu aperas unualoke en la ĉefa fonto de informo. La titolvariantojn de la ceteraj verkoj oni registras en la kampo 740 (Sekundara alirpunkto. Nekontrolita/analiza titolo) aŭ en kiu ajn alia kampo 7XX (Sekundaraj alirpunktoj).

Kiam ili funkcias kiel noto, la titolvariantoj estas antaŭataj de termino aŭ enkonduka frazo kreita kiel etikedo asociita al la valoro de la dua indikilo.

Ĉi kampo estis komence dezajnita por serioj, sed ĝia uzado ĝeneraliĝis al la ceteraj materialoj.

Indikiloj:

1a: Kontrolo de noto/kontrolita alirpunkto

- 0 – Sen noto, sen alirpunkto
- 1 – Kun noto kaj alirpunkto
- 2 – Noto, sen alirpunkto
- 3 – Sen noto, kun alirpunkto

2a: Tipo de titolo

- # - Oni ne donas informon
- 0 – Parto de titolo
- 1 – Paralela titolo
- 2 – Distinga titolo
- 3 – Plia titolo
- 4 – Titolo de la kovrilo
- 5 – Titolo de la aldona titolpaĝo
- 6 – Titolo el la kapo
- 7 – Titolo de la marĝeno
- 8 – Titolo de la spino

Ĉefaj subkampoj:

ŝa Titolvarianto (NR)

[Same kiel en kampo 245](#)

ŝb Resto de titolo (NR)

[Same kiel en kampo 245](#)

ŝf Dato aŭ indiko de sinsekvo (NR)

Datoj aŭ numeroj de volumo aŭ parto de serio rilataj al la titolaldono. Oni ne uzas ĉi subkampon, kiam la valoro de la dua indikilo estas "0" aŭ "1".

246 14 ŝaState publications monthly checklistŝfJuly 1976-

ŝi Montrata teksto (NR)

Teksto montrenda, kiam neniu el la etikedoj ligitaj a la valoroj 2-8 de la dua indikilo taŭgas. Kiam ĉeestas ĉi subkampo, la dua indikilo enhavas la valoron # (oni ne donas informon). La subkampo ŝi antaŭas la sukampon \$a komence de la kampo.

245 00 \$aBulletin of atomic scientists.

246 1# \$iAntaŭ la titolo:\$aScience and public affairs\$fJan. 1970-Apr. 1974

246 1# \$iTitolo de la ujo:\$aNew Brunswick royal gazette

246 1# \$iAlternaj numeroj publikigitaj kun la titolo:\$aChicago daily telegraph

\$n *Numero de la parto aŭ sekcio de la verko (R)*

[Same kiel en kampo 245](#)

\$p *Nomo de parto aŭ sekcio de verko (R)*

[Same kiel en kampo 245](#)

250 – Mencio pri eldono (R)

En ĉi kampo oni registras la informon rilatan al la eldono de verko.

Indikiloj:

Nedifinitaj, ambaŭ entenas blankon (#)

Ĉefaj subkampoj:

\$a *Mencio pri eldono*

La mencio pri eldono kutime konsistas el numero kaj akompana vorto kaj/aŭ mallongigo. Se mencio pri eldono aperas en pli ol unu lingvo, nur la unuan mencion oni registras en \$a. Ĝi enhavas ĉiun titolan informon ĝis la unua interpunkcia signo kaj inkluzivas ĝin: egalsigno (=), klinita streko (/).

250 ## \$a3a eldono

250 ## \$aDua eldono, dua represo

250 ## \$aTria ofseta represo laŭ la dua eldono

250 ## \$aDua reviziita eldono =\$b...

250 ## \$a2a eld. /\$b...

\$b *Resto de la mencio pri eldono.*

Ĝenerale temas pri mencio pri respondeco kaj/aŭ paralela mencio pri eldono

250 ## \$aUnua eldono =\$bPrimera edición

250 ## \$a3a eldono /\$breviziita de Paul Watson.

264 – Produktado, Publikigo, Distribuado, Fabrikado kaj Kopirajto (R)

En ĉi kampo oni registras la menciojn pri produktado, publikigo, distribuado, fabrikado kaj kopirajto. Por simpligi la klarigojn, nur la indikojn pri la eldonisto estas menciata, sed ĉio funkcias same por la produktanto, la distribuanto aŭ la fabrikanto (presisto en tekstaj materialoj).

Indikiloj

1a: Sinsekvo de mencioj

- Ne aplikebla, aŭ oni ne donas informon, aŭ unua disponebla eldoninto.

En monografioj oni uzas ĉiam ĉi indikilon, eĉ se ŝanĝiĝas la eldonisto en plurvolumaj verkoj. En seriaĵoj oni uzas ĝin se la eldoninto ne ŝanĝiĝas laŭlonge de la publikado aŭ por indiki la unuan.

264 #1 \$aChicago :\$bUniversity of Chicago Press,\$c1955.

2 – Intera eldonisto

Uzata en seriaĵoj kiam ŝanĝiĝas la eldoninto aŭ la eldonloko. Ĝi indikas la eldonintojn en interaj jaroj. Uzenda komplemente kun \$3.

264 21 \$31980-May 1993\$aLondon :\$bVogue

3 – Nuna/lasta

Uzata en seriaĵoj kiam ŝanĝiĝas la eldoninto aŭ la loko de eldono. Ĝi indikas la nunan eldonanton, aŭ la lastan se la seriaĵo estas jam fermita. Uzenda komplemente kun \$3.

264 31 \$31998-\$aWashington, D.C. :\$bNational Agriculture Library

2a: Funkcio de la korporacio

0 – Produktado (la kampo enhavas mencion pri nepublikigita risurco).

1 – Publikigo (la kampo enhavas mencion pri la publikigo de risurco: eldonloko, eldonisto/eldoninto, eldonjaro).

2 – Distribuado (la kampo enhavas mencion pri la distribuado de risurco)

3 – Fabrikado (la kampo enhavas mencion pri la fabrikado (presado, ktp.) de risurco)

4 – Kopirajto (la kampo enhavas daton ligitan al kopirajto; ĝi ankaŭ rilatas al la dato de fonogramo por sonrisurcoj)

Ĉefaj subkampoj

\$a – Loko de produktado, publikigo, distribuado aŭ fabrikado. (R)

La subkampo \$a inkludas la datenojn ĝis la unua ISBD-interpunkcia signo (dupunkto (:)) kiam la subkampon \$a sekvas subkampo \$b kaj punktokomo (;) kiam la subkampon \$a sekvas alia subkampo \$a).

264 #1 \$aNew York, N.Y. :\$bElsevier,\$c1984.

260 #1 \$aNew York ;\$aBerlin :\$bSpringer Verlag,\$c1977

\$b – Nomo de produktanto, eldoninto, distribuanto aŭ fabrikinto (R).

La subkampo \$b ĉiam iras antaŭata de dupunkto (:) kaj inkludas la datenojn ĝis la ISBD-interpunkcia signo, kiu antaŭas la sekvan elementon (komo (,)), kiam post la subkampo \$b venas subkampo \$c; dupunkto (:) kiam post ĝi venas alia subkampo \$b; aŭ punktokomo (;) kiam post ĝi venas alia subkampo \$a).

264 ## \$aNew York :\$bAmerican Statistical Association,\$c1975

264 #1 \$aRotterdam :\$bUniversala Esperanto-Asocio :\$bVeenman Drukkers B.V.,\$c1981

261 #1 \$aParis :\$bGauthier-Villars ;\$aChicago :\$bUniversity of Chicago Press,\$c1955.

\$c – Dato de produktado, eldonado, distribuado aŭ fabrikado, aŭ dato de kopirajto.

La subkampo \$c ĉiam iras antaŭata de komo (,), krom se ĝi estas la unua subkampo de la kampo 264.

264 #1 \$aNew York :\$bAmerican Statistical Association,\$c1975

264 #4 \$c©2002

264 #4 \$c©1983

\$3 – Specifitaj materialoj

Informo por diferencigi la plurajn menciojn de la priskribita materialo, al kiuj la kampo aplikiĝas. En la kazo de serioj, temas pri la jaroj, kiam funkciis la diversaj eldonintoj de la eldonaĵo.

264 #1 \$aParis ;\$aNew York :\$bVogue,\$c1964-

264 21 \$31980-May 1993\$aLondon :\$bVogue

264 31 \$3June 1993-\$aLondon :\$bElle

[La eldonaĵo komenciĝis en 1964 kaj tiam ĝi estis publikigita de Vogue, kun sidejoj en Parizo kaj Novjorko; inter 1980 kaj majo de 1993, la sidejo translokiĝis al Londono; kaj ekde junio 1993, la gazeto estas publikigita de Elle, en Londono.]

300 – Fizika priskribo (R)

La kampo utilas por doni fizikan priskribon de la risurco kiel la amplekson, la dimensiojn, aliajn fizikajn detalojn kaj priskribon de la aldona materialo.

Indikiloj:

Nedifinitaj, ambaŭ entenas blankon (#)

Ĉefaj subkampoj:

\$a Amplekso

La amplekso de la risurco ofte konsistas el nombro de paĝoj kaj/aŭ de volumoj (presaĵoj), totala tempo de reproduktado (son- kaj videoregistraĵoj), ktp.

La subkampo \$a enhavas la informon ĝis la sekva ISBD-interpunkcia signo (dupunkto (:)) se estas subkampo \$b); punktokomo (;) se ne estas subkampo \$b).

300 ## \$a149 paĝoj ;\$c23 cm

300 ## \$a3 volumoj (657 paĝoj) :\$bilustraĵoj ;\$c24 cm

\$b Aliaj fizikaj detaloj

Temas pri fizikaj karakterizaĵoj kiaj ilustraĵoj, koloro, rapideco de reproduktado, prezentformato de filmo, ktp.

La subkampon §b antaŭas la ISBD-interpunkcia signo dupunkto (:) kaj enhavas la informon ĝis la sekva ISBD-interpunkcia signo, punktokomo (;).

300 ## \$a104 paĝoj :\$bfotografajoj ;\$c20 cm

§c Dimensioj

Temas pri la mezuroj de la risurco esprimataj en centimetroj aŭ milimetroj.

La subkampon antaŭas la ISBD-interpunkcia signo punkto (;) kaj enhavas la informon ĝis la sekva ISBD-interpunkcia signo, plus-signo (+), se ĝi ekzistas.

300 ## \$a149 paĝoj ;\$c23 cm

300 ## \$a271 paĝoj :\$bilustraĵoj ;\$c10 x 27 cm

§e Akompana materialo

La subkampo povas inkludi fizikan priskribon de la akompana materialo parenteze. Ĝi iras ĉiam antaŭata de plus-signo (+).

300 ## \$a271 paĝoj :\$bilustraĵoj ;\$c21 cm +\$e1 CD-ROM

300 ## \$a314 paĝoj ;\$c25 cm +\$e1 broŝuro (25 paĝoj : ilustraĵoj ; 15 cm)

310 – Nuna periodeco (R)

En ĉi kampo oni registras la nunan periodecon de seriaĵo. Kiam la komenca dato de la nuna periodeco ne koincidas kun la komenca dato de la eldonaĵo, oni inkludas ankaŭ la datojn, kiam tiu periodeco komenciĝis.

Indikiloj:

Nedifinitaj, ambaŭ entenas blankon (#)

Ĉefaj subkampoj:

§a Nuna periodeco

Kompleta mencio de la nuna periodeco.

310 ## \$aJara

310 ## \$aMonata, escepte de julio-aŭgusto

§b Dato de komenciĝo de la nuna periodeco

Dato de komenciĝo de la nuna periodeco, kiam ĝi malsamas de la dato de komenciĝo de la eldonaĵo kaj kiam en kampo 321 aperas antaŭa periodeco.

310 ## \$aJara,\$b1983-

310 ## \$aMonata,\$b1984-

321 ## \$aPeriodeco varias,\$b1966-1983

310 ## \$aMonata,\$b1958-
321 ## \$aDumonata,\$b1954-1957

310 ## \$aDuonmonata,\$b1946-1948
321 ## \$aMonata,\$b1931-1945

321 – Antaŭa periodeco (R)

Antaŭa periodeco de daŭra risurco, kiam aperas la nuna periodeco en kampo 310.

Indikiloj:

Nedifinitaj, ambaŭ entenas blankon (#)

Ĉefaj subkampoj:

\$a *Antaŭa periodeco*

Kompleta mencio de la antaŭa periodeco de la dokumento.

310 ## \$aMonata,\$b1985-
321 ## \$aDumonata,\$b1982-1984

310 ## \$aJara,\$b1983-
321 ## \$aMonata,\$bMar. 1972-Dec. 1980
321 ## \$aDuonjara,\$b1981-1982

En la kampo 321 eblas uzi la esprimon “Periodeco varias”, kiam oni konas pli ol tri antaŭajn periodecojn.

310 ## \$aMonata,\$b1984-
321 ## \$aPeriodeco varias

\$b *Dato de komenciĝo de la antaŭa periodeco*

310 ## \$aJara,\$b1984
321 ## \$aDujara,\$b1966-1983

Se la subkampo \$a enhavas la esprimon “Periodeco varias”, la subkampo \$b enhavas la ekstremajn datojn de la malsamaj periodecoj.

310 ## \$aDuonmonata,\$b1970-
321 ## \$aPeriodeco varias,\$b1920-1969

336 – Tipo de enhavo (R)

Formo de komunikado per kiu verko estas esprimita. Uzita kune kun 000/06 (Tipo de rikordo), kiu indikas la ĝeneralan specon de enhavo de la risurco. La informo registrita en la kampo 336 ebligas konkretigi la tipon de enhavo de la risurco.

Indikiloj:

Nedifinitaj, ambaŭ entenas blankon (#)

Ĉefaj subkampoj:

\$a *Tipo de enhavo*

Enhavas la terminon, kiu priskribas la katalogatan risurcon, prenitan el fermita terminaro¹⁵.

336 ## \$aTeksto

336 ## \$aMuziko interpretita

Eblas agordi la sistemon por ke ĉi subkampo estu aŭtomate plenigita per implicita termino aŭ por ke la termino estu elektebla el terminaro prezentita per faldebla menuo.

\$2 *Fonto*

MARC-kodo, kiu identigas la terminaron uzatan por registri la tipon de enhavo.

336 ## \$aTeksto\$2rdacontent

336 ## \$aMuziko interpretita\$2rdacontent

En rikordoj kreitaj laŭ RDA, tiu kodo ĉiam estos “*rdacontent*”. Eblas agordi la sistemon por ke ĉi subkampo estu aŭtomate plenigita kaj prezentu ĉiam la kodon implicate.

\$3 *Specifitaj materialoj*

Parto de la katalogata risurco al kiu la termino aplikeblas en risurcoj kun pluraj tipoj de medioj.

336 ## \$3Presajo\$aTeksto\$2rdacontent

336 ## \$3CD-Audio\$aMuziko interpretita\$2rdacontent

[La risurco konsistas el libro akompanata de CD-Audio kun kantoj]

337 – *Tipo de medio (R)*

Indikas la ĝeneralan tipon de peranta aparato necesa por vidi, aŭskulti, spekti, ktp., la enhavon de la katalogata rimedo. Aŭ la neneceso de tia perado.

Indikiloj:

Nedifinitaj, ambaŭ entenas blankon (#)

Ĉefaj subkampoj:

\$a *Tipo de enhavo*

Enhavas la terminon, kiu priskribas la katalogatan risurcon, prenitan el fermita terminaro¹⁶.

337 ## \$asenpera

337 ## \$aaŭda

¹⁵ <https://www.loc.gov/standards/valuelist/rdacontent.html>

¹⁶ <https://www.loc.gov/standards/valuelist/rdamedia.html>

Eblas agordi la sistemon por ke ĉi subkampo estu aŭtomate plenigita per implicita termino aŭ por ke la termino estu elektebla el terminaro prezentita per faldebla menuo.

§2 Fonto

MARC-kodo, kiu identigas la terminaron uzatan por registri la tipon de enhavo.

337 ## \$asenpera\$2rdamedia

337 ## \$aaŭda\$2rdamedia

En rikordoj kreitaj laŭ RDA, tiu kodo ĉiam estos “*rdamedia*”. Eblas agordi la sistemon por ke ĉi subkampo estu aŭtomate plenigita kaj prezentu ĉiam la kodon implicate.

§3 Specifitaj materialoj

Parto de la katalogata risurco al kiu la termino aplikeblas en risurcoj kun pluraj tipoj de medioj.

337 ## \$3Presajo\$asenpera\$2rdamedia

337 ## \$3CD-Audio\$aaŭda\$2rdamedia

[*La risurco konsistas el libro akompanata de CD-Audio kun kantoj*]

338 – Tipo de portilo (R)

Indikas la formaton de la portilo.

Indikiloj:

Nedifinitaj, ambaŭ entenas blankon (#)

Ĉefaj subkampoj:

\$a Tipo de portilo

Enhavas la terminon, kiu priskribas la katalogatan risurcon, prenitan el fermita terminaro¹⁷.

338 ## \$avolumo

338 ## \$asondisko

Eblas agordi la sistemon por ke ĉi subkampo estu aŭtomate plenigita per implicita termino aŭ por ke la termino estu elektebla el terminaro prezentita per faldebla menuo.

§2 Fonto

MARC-kodo, kiu identigas la terminaron uzatan por registri la tipon de portilo.

338 ## \$avolumo\$2rdacarrier

338 ## \$asondisko\$2rdacarrier

En rikordoj kreitaj laŭ RDA, tiu kodo ĉiam estos “*rdacarrier*”. Eblas agordi la sistemon por ke ĉi subkampo estu aŭtomate plenigita kaj prezentu ĉiam la kodon implicate.

§3 Specifitaj materialoj

¹⁷ <https://www.loc.gov/standards/valuelist/rdacarrier.html>

Parto de la katalogata risurco al kiu la termino aplikeblas en risurcoj kun pluraj tipoj de medioj.

338 ## \$3Presajo\$avolumo\$2rdacarrier

338 ## \$3CD-Audio\$asondisko\$2rdacarrier

[La risurco konsistas el libro akompanata de CD-Audio kun kantoj]

347 – Teknikaj detaloj de la bita dosiero (R)

Registru en ĉi kampo la teknikajn specifaĵojn de la bita kodado de teksto, bildoj, aŭdio, video kaj aliaj datentipoj en la risurco. Ĉi tiu informo ankaŭ povas esti registrita en kampo 300 (fizika priskribo), subkampo \$b (aliaj fizikaj detaloj).

Indikiloj:

Nedifinitaj, ambaŭ entenas blankon (#)

Ĉefaj subkampoj:

\$a *Tipo de dosiero (R)*

Ĝenerala tipo de datenenhavo kodita en komputila dosiero

347 ## \$aTeksta dosiero

347 ## \$aSondosiero

347 ## \$aVidea dosiero

347 ## \$aBilda dosiero

347 ## \$aDaten-dosiero

\$b *Koda formato (R)*

Skemo, normo, ktp., uzata por kodi la bitan enhavon de risurco.

347 ## \$aTeksta dosiero\$bPDF

347 ## \$aSondosiero\$bCD-aŭdio

347 ## \$aVidea dosiero\$bDVD-video

347 ## \$aBilda dosiero\$bJPEG

347 ## \$aDaten-dosiero\$bXML

\$c *Dosiergrando (R)*

La nombro da bajtoj en bita dosiero.

347 ## \$aBilda dosiero\$bJPEG\$c3.1 megabilderoj¹⁸

347 ## \$aDaten-dosiero\$bXML\$c182 KB

362 – Datoj de publikigo kaj/aŭ sinsekva nomado (R)

En ĉi kampo oni registras la komencajn kaj finajn datojn de publikigo de iu dokumento kaj/aŭ la menciojn pri sekvenco uzitajn en ĉiu parto. La datoj uzotaj estas la kronologiaj referencoj, kiuj

¹⁸ Bildero. Angle: pixel (<https://komputeko.net/#pixel>). Megabildero. Angle: megapixel.

identigas la individuajn numerojn de la seria eldonaĵo. La mencioj pri sekvenco ĝenerale estas numeraj, sed ili povas esti ankaŭ alfabetaj. La informo povas esti normigitaj aŭ nenormigitaj. Se la informon pri la dato oni akiras el fonto alia ol la unua kaj/aŭ lasta numero de la eldonaĵo, oni registras ĝin per nenormigita noto kaj ĝenerale oni citas la fonton.

La datoj en ĉi kampo povas esti identaj al la informoj en kampoj 008/07-10 (unua dato) kaj/aŭ 008/11-14 (dua dato). Oni ne registras nekompletajn, proksimumajn aŭ dubindajn datojn en ĉi kampo.

La kampo 362 estas ripetebla nur se oni devas registri normigitan kaj nenormigitan informon, kiel specifite en la unua indikilo.

Indikiloj

1a: Formato de la dato

0 – Normigita.

Oni registras la datojn laŭ normigita formo anstataŭ laŭvorte. Normigitaj datoj estas dezajnitaj por aperi post la titolo kaj eldon-informo. Alfabetajn kaj/aŭ nombrajn, kronologiajn aŭ aliajn referencojn oni registras tiel, kiel ili aperas en la eldonaĵo.

362 0# \$aVol. 1, no. 1 (Apr. 1981)-

362 0# \$a1968-

362 0# \$a72/1 ([Feb. 1972])-

362 0# \$aVol. 1, no. 1 (Apr. 1983)-v. 1, no. 3 (June 1983)

1 – Ne normigita.

Nenormigitajn datojn oni registras kiel noto. Ĉi tiu valoro estas uzata kiam la unua kaj/aŭ lasta kajero ne estas haveblaj sed la informo estas deduktita el aliaj kajeroj aŭ prenita el aliaj fontoj.

362 1# \$aStartis en 1930.\$zCf. Letter from Ak. State Highway Dept., Aug. 6, 1975.

362 1# \$aStartis kun vol. 4, publikigita en 1947.

362 1# \$aĈesis kun n-ro 2 (1964)

2a: Ne difinita

Enhavas blankon (#)-

Ĉefaj subkampoj

\$a – Datoj de publikigo kaj/aŭ sinsekva nomado (NR)

Sinsekva nomado povas konsisti el la voluma numero, eldon-numero, kajera numero, serio de volumnumeroj, aŭ aliaj nomadoj de sinsekvoj laŭ la bontrovo de la eldonanto. La dato povas konsisti el la jaro, monato, aŭ tago; monato aŭ sezono kaj jaro; aŭ nur jaro, depende de la periodeco de la eldonaĵo kaj ilia uzado fare de la eldonanto. Menciojn pri sinsekvo kaj datojn oni registras tiel, kiel ili aperas en la dokumento. Mencio pri fino de publikigo sekvas la mencion pri komenco de publikigo.

Kiam mencioj numera kaj kronologia aperas kune, registru ĉi-lastan inter parentezoj.

362 0# \$aVol. 1 (Mar. 1980)-

362 0# \$aVol. 77, num. 1 (enero-abr. 1981)-

362 0# \$aVol. 85B, no. 1 (Jan./Feb. 1945)-v. 92, no. 6 (Nov./Dec. 1952)

362 0# \$a1962-1965.

\$z – Fonto de informo (NR)

Registru en \$z la fonton, kie oni ĉerpis la informon registritan en \$a. Ĉi subkampon oni uzas nur kiam la unua indikilo enhavas la valoron “1” (nenormigita noto).

La mallongigo “Cf.”¹⁹ antaŭas la titolon de la citita eldonaĵo aŭ datenbanko.

362 1# \$aKomenciĝis kun 1962/64.\$zCf. New serial titles.

Se ekzistas \$z, la antaŭanta interpunkcio estas punkto.

490 – Mencio pri serio (R)

Indikiloj:

1a: Politiko pri kontrolo de serioj

0 - Serioj ne kontrolataj (*valoro ĉiam rekomendita por Esperanto-katalogoj*)

1 - Serioj kontrolataj (*tio signifas, ke oni donas, cetere, alirpunkton pri la serio, kiu devas esti kontrolata per aŭtoritata rikordo*)

2a: Nedifinita, entenas blankon (#)

490 0# \$aStafeto

Subkampoj

\$a Mencio pri serio

Titolo de la serio, inkluzive de la nombroj kaj titoloj de subsekcioj, titolaldonoj kaj mencioj pri respondeco.

490 0# \$aStafeto. Beletraj kajeroj

490 0# \$aIltis-serioj. I, Beletro originala

490 0# \$aEsperanto : kolekto de La Revuo

La subkampo ripeteblas, kiam subserio estas apartigita de la ĉefserio per la numerado de la ĉefserio en subkampo \$v aŭ per la ISSN en subkampo \$x, aŭ kiam serio havas paralelan titolon.

490 0# \$aSkarby muzeiv Ukraïny = \$aSokrovishcha muzeev Ukrainy

490 0# \$aAmerican education today,\$x0177-6559.\$aDevelopments in elementary education

490 0# \$aBiblioteca de arte ; \$vno. 8.\$aArtes aplicadas ; \$v2

\$v Numerado de la serio

Numerado de la serio aŭ kiu ajn alia sistemo por indiki la sinsekvon ene de la serio

490 0# \$aStafeto. Belliteratura serio ; \$v27-28

¹⁹ Cf. Mallongigo de la latina “confer”, en Esperanto, “komparu”.

\$x **ISSN**

Internacia Norma Seria Numero por titolo de serio, kiu enestas en la mencio pri serio.

490 0# \$aAmerican education today,\$x0177-6559.\$aDevelopments in elementary education

\$3 **Specifitaj materialoj**

Parto de la priskribita materialo al kiu la serio estas aplikebla. Ofte temas pri plurvolumaj risurcoj en kiu ne ĉiuj volumoj apartenas al la sama serio.

490 0# \$3Volumo 3:\$aDiskutkajeroj

Kampoj pri notoj

La kampoj pri notoj utilas por doni informon utilan por kiuj ne ekzistas difinita kampo.

500 – Ĝenerala noto (R)

Indikiloj:

Nedifinitaj, ambaŭ entenas blankon (#)

Ĉefa subkampo:

\$a **Ĝenerala noto**

Ĝenerala informo por kiuj ne ekzistas pli specialigita noto.

500 ## \$aTitolo prenita el la kovrilo

502 – Noto pri disertacio (R)

Indikiloj:

Nedifinitaj, ambaŭ entenas blankon (#)

Ĉefa subkampo:

\$a **Noto pri disertacio**

Akademia disertacio aŭ tezo kaj la institucio en kiu ĝi estis prezentita.

502 ## \$aDisertacio--Université Paris 5 René Descartes, 1981

504 – Noto pri bibliografio (R)

Indikiloj:

Nedifinitaj, ambaŭ entenas blankon (#)

Ĉefa subkampo:

\$a **Noto pri bibliografio**

Indiko pri la enesto de bibliografio en la risurco. La noto utilas ankaŭ por filmografio kaj diskografio.

504 ## \$aBibliografio: paĝoj 125-130

504 ## \$aDiskografio: paĝoj 240

504 ## \$aBibliografiaj referencoj kaj indekso

505 – Noto pri enhavo (R)

La noto povas inkludi titolojn de sendependaj verkoj aŭ partojn de la risurco, aŭ enhavtabelojn. Ĝi ankaŭ povas inkludi menciojn pri respondeco.

Ĉi tiu kampo enhavas normigitan noton pri enhavo. La informo povas esti registrita laŭ du niveloj: baza aŭ kompleta. Por kelkaj materialoj, ĝi povas inkludi informon, kiu normale apartenas al aliaj kampoj de priskribo (ekzemple, la mencio pri eldono, la nombro de paĝoj).

La noton oni montras ĉe la ekrano per enkonduka vorto aŭ frazo generita de la sistemo surbaze de la valoro de la unua indikilo.

Indikiloj

1a: Etikedo de vidigo

0 – Kompleta enhavo (*oni registras la tutan enhavon de la risurco, la biblioteko disponas ĝin kompleta*)

505 0# \$avolumo 1. Karbo -- volumo. 2. Nitrogeno -- volumo. 3. metaloj

1 – Nekompleta enhavo (ne ĉiuj fizikaj unuoj de la verko estas haveblaj, ĉar ili ne estis publikigitaj aŭ ne estis akiritaj de la biblioteko).

505 1# \$avolumo 1. Karbo -- volumo. 2. Nitrogeno

2 – Parta enhavo (*priskribas nur elektitajn partojn de risurco eĉ se oni disponas de ĉiuj por ilia katalogado*)

505 2# \$aBirdotimigilo / traducción al esperanto de Jorge Camacho (paĝo 39)

[*La risurco estas poemaro de la poeto Carlos Mestres, unu el kies poemoj estis tradukita en Esperanton de Jorge Camacho. Por la karaktero de la posedanta biblioteko, estas interese kontroli tiun tradukon*]

8 – Sen generita etikedo por vidigo (*oni preferas ne uzi unu el la aŭtomate generitaj etikedoj, sed mem tajpi ĝin*)

505 8# \$aEnhavo de la CD-ROM: Bibliografio, resumoj kaj mapoj

2a: Nivelo de enhavo

– Baza (*ĉi tiu estas la nivelo rekomendita por Esperanto-katalogoj*).

0 – Kompleta

\$a Noto pri enhavo en normigita formato

La teksto de la noto povas inkludi titolojn, menciojn pri respondeco, numeron de volumo, ktp. Ĉi tiujn elementojn oni disigas per ISBD-interpunkcio.

La formato de la noto estas determinita de la aplikata kataloga regularo, niakaze, RDA. Oni registras la informon en ĉi kampo kun la sama ISBD-interpunkcio, kiun ĝi havus se registrita en la koncernaj ĉefaj kampoj.

505 0# \$aMenlago / Theodor Storm. Maruŝka / Mela Escherich

[Unuvoluma risurco, kiu enhavas du verkojn de du malsamaj aŭtoroj]

245 10 \$a Historio de la lingvo Esperanto

505 0# \$aDeveno kaj komenco, 1887-1900 (74 paĝoj) -- La movado, 1900-1927 (199 paĝoj)

[Du voluma risurco, kiu enhavas unu verkon, kies partojn havas proprajn titolojn]

511 – Noto pri partoprenantoj aŭ interpretistoj (R)

Informo pri la partoprenantoj, interpretistoj, rakontistoj, prezentistoj aŭ aktoroj.

Indikiloj

1a: Kontrolo de la etikedo de vidigo

0 – Sen generita etikedo por vidigo

1 – Interpretistoj

2a: Ne difinita, entenas blankon (#)

Ĉefa subkampo:

\$a **Noto pri partoprenantoj aŭ interpretistoj**

511 0# \$aMarshall Moss, violono ; Neil Roberts, piano.

511 1# \$aAnne Baxter (Louise), Gustavo Rojo (Bill), Reginald Gilliam (S-ro Johnson), [Catherine Elliot] (Onklino Sallie), Ben Tatar (kenero).

511 1# \$aColin Blakely, Jane Lapotaire.

511 0# \$aAnchor, Dan Rather.

511 0# \$aVoĉoj: Peter Ustinov, Cloris Leachman, Sally Kellerman, Andy Devine.

511 0# \$aPrezentisto: Alfred Hitchcock.

511 0# \$aRakontisto: Burl Ives.

515 – Noto pri apartaĵoj de la numerado (R)

Ne normigita noto, kiu indikas la neregulaĵojn kaj apartaĵojn en la numerado, inkluzive de duobla numerado, eraro en la uzo de la numerado ktp.

Indikiloj:

Nedifinitaj, ambaŭ entenas blankon (#)

Ĉefa subkampo:

\$a **Noto pri apartaĵoj de la numerado**

515 ## \$aEkde la n-ro 25 (marto 2023), la numerado estas nur kronologia

515 ## \$aEn 1975 komenciĝas nova epoko kun ŝanĝo de numerado.

515 ## \$aNumerado komenciĝas per la numero 3

515 ## \$aVolumo 13 (1919) erare nomata volumo 14 (1919)
515 ## \$aNumerado komenciĝas per la numero 6 kaj daŭrigas laŭ malkreskanta ordo
515 ## \$aNumerado rekomenciĝas ĉiujare
515 ## \$aMalregulaĵoj en la numerado; la kronologia ordo de la volumoj ne respondas al kronologia ordo de eldonado
515 ## \$aLa eldonaĵo havas plurajn epokojn sen ŝanĝo de numerado
515 ## \$aLa numeron 1 antaŭis propaganda numero sen dato de publikigo.

525 – *Noto pri suplemento (R)*

Informo pri la ekzisto de suplementoj kaj/aŭ specialaj numeroj, kiujn oni ne katalogas en sendependaj rikordoj kaj ne estas inkluditaj en kampo 770 (Ligilo al suplemento/speciala numero). Ĝenerale, oni uzas ĉi noton kiam la suplementoj kaj/aŭ specialaj numeroj ne havas specifan titolon.

Indikiloj:

Nedifinitaj, ambaŭ entenas blankon (#)

Ĉefa subkampo:

\$a *Noto pri suplemento*

525 ## \$aKelkaj numeroj akompanataj de suplemento.
525 ## \$aHavas plurajn suplementojn.
525 ## \$aAparta aldono akompanas v. 5.

530 – *Noto pri plia disponebla formato (R)*

Informoj pri malsama tuŝebla formato, en kiu la priskribita dokumento estas ankaŭ havebla.

Indikiloj:

Nedifinitaj, ambaŭ entenas blankon (#)

Ĉefa subkampo:

\$a *Noto pri plia disponebla formato*

530 ## \$aEldonita ankaŭ kiel 16 mm-filmstrio en kartoĉo kaj kiel videoregistraĵo.
530 ## \$aEldonita ankaŭ kiel filmo.
530 ## \$aDisponebla sur mikrofilmo

534 – *Noto pri la originala versio*

Informo pri la originala versio de eldonaĵo, kiam la rikordo priskribas reproduktaĵon kaj la datenoj respektive de la originalo varias. La gravajn detalojn de la originalo oni donas en la kampo 534.

Indikiloj:

Nedifinitaj, ambaŭ entenas blankon (#)

Ĉefaj subkampoj:

- \$a** *Ĉefa alirpunkto de la originalo (NR)*
- \$b** *Mencio pri eldono de la originalo (NR)*
- \$c** *Publikigo, distribuado, ktp de la originalo (NR)*
- \$e** *Fizika priskribo de la originalo (NR)*
- \$f** *Mencio pri serio de la originalo (NR)*
- \$p** *Enkonduka frazo (NR)*
- \$t** *Mencio pri titolo de la originalo (NR)*
- \$x** *ISSN (R)*
- \$z** *ISBN (R)*
- \$3** *Materialoj specifitaj (NR)*

534 ## \$pReproduktaĵo de la eldono de: \$cMadrid : Santiago Burgos, 1905

534 ## \$pReproduktaĵo de: \$tObres socràtiques menors. \$b2^a ed. \$c Barcelona : Fundació Bernat Metge, 1931. \$fEscriptors grecs

534 ## \$pRepreso de la: \$b1a eld. \$cEkrelo, 1932

534 ## \$3vol. 2 \$pReproduktaĵo de la eldono de: \$cMadrid : Casa Editorial Hernando, 1924.

538 – Noto pri la postuloj de la programo (R)

Teknika informo pri risurco, kiel la ĉeesto aŭ foresto de certaj kodtipoj aŭ la fizikaj karakterizaĵoj de komputila dosiero, kiel la registro-denseco, programlingvo, komputilaj postuloj aŭ postuloj de la flankaparatoj. Por son- kaj video-registraĵoj, eblas inkludi informon pri la komerca nomo aŭ la registra sistemo (ekz. VHS), modula frekvenco, ktp.

Ĝi povas ankaŭ enhavi ligilojn kun teknikaj detaloj rilataj al bitaj risurcoj.

Por programaroj, la komputilaj postuloj povas rilati la fabrikinton kaj modelon, la operaciuman sistemon aŭ memoron.

Indikiloj:

Nedifinitaj, ambaŭ entenas blankon (#)

Ĉefaj subkampoj:

\$a *Noto pri detaloj de la sistemo*

Kompleta teksto de la noto.

538 ## \$aNecesa programaro: Adobe Acrobat Reader

538 ## \$aNecesa programaro: Windows 95/98/ME/2000/XP, Pentium 100 MHz, 16 Mb de RAM-memoro, 27 MB de libera spaco en durdisko, grafikarkarto SVGA, sonkarto kaj fakultative, mikrofono.

538 ## \$aNecesa programaro: IBM 360 kaj 370; 9K bajtoj de interna memoro; OS SVS kaj OSMVS.

538 ## \$aNecesa programaro: DVD ROMo, rettumilo subtenanta SHTML 1.0

538 ## \$aVHS.

538 ## \$aNecesa programaro: epub-legilo

538 ## \$aAlirmaniero: Elektronika poŝto per Interreto kaj BITNET; ankaŭ havebla per FTP.

538 ## \$aAlirmaniero: Interreto.

\$u Unuforma Risurca Identigilo (URI)

Unuforma Risurca Identigilo (URI), ekzemple URL aŭ URN, kiu provizas, per norma sintakso, la necesajn datenojn por elektronika aliro. Ĉi informo povas esti uzata por aŭtomate aliri elektronikan dokumenton pere de unu el la Interretaj protokoloj.

538 ## \$aProject methodology for digital version

\$uhttp://www.columbia.edu/dlc/linglung/methodology.html

\$i Montrata teksto

Montrado kaj identigo de la materialoj priskribitaj en subkampo \$u.

538 ##\$aProject methodology for digital version*\$iTeknikaj*

detaloj: \$uhttp://www.columbia.edu/dlc/linglung/methodology.html

538 ##\$aBenchmark for Faithful Digital Reproductions of Monographs and Serials. Version 1.

December 2002*\$iBitversio*: \$uhttp://www.diglib.org/standards/bmarkfin.htm

546 – Noto pri lingvo (R)

Uzata por indiki la lingvojn, alfabetojn aŭ skribsistemojn de la risurco, kiam estas pli ol unu. Oni uzas ĝin en kombino kun 008/35-37 (Lingvo) kaj la kampo 041

Indikiloj:

Nedifinitaj, ambaŭ entenas blankon (#)

Ĉefaj subkampoj:

\$a Noto pri lingvo

Lingvo aŭ lingvoj de la risurco

504 ## \$aTeksto en la itala, traduko en Esperanto

041 1# \$aita\$aepo\$hita

008/35-37 ita

504 ##\$aTekstoj en Esperanto, la angla kaj la hungara

041 0# \$a\$aepo\$aeng\$aahun

008/35-37 ita

\$b Informo pri la alfabeto

Alfabeto aŭ skribsistemo de la risurco. Tio inkludas ankaŭ tipografiojn aŭ specialajn kodojn (kirila, greka hebrea, araba aŭ latinaj alfabetoj; Brajlo, Fraktur, ktp.)

Oni uzas ĉi subkampon, kiam iu lingvo povas esti skribita per du malsamaj alfabetoj (ekzemple, la serba) por indiki kiu estas uzata en la risurco. Se la risurco estas en la rusa, ne necesas indiki la alfabeton, ĉar la rusa ĉiam estas skribita per la kirila. Simile kun la ceteraj lingvoj.

Oni disigas ambaŭ elementojn per dupunkto (:)

504 ## \$aEn la serba: \$bKirila alfabeto

008/35-37 srp

504 ## \$aEn la germana: \$bFraktur

008/35-37 ger

504 ## \$bEn brajlo

008/35-37 epo

550 – Noto pri respondeca korporacio (R)

Informo pri la korporacioj, nunaj aŭ antaŭaj, respondecaj pri la publikigado de daŭra risurco.

Inkludas notojn kun informo pri redaktado, kompilado aŭ tradukado realigitaj de respondeca korporacio, kaj notojn, kiuj identigas eldonaĵon kiel oficiala organo de asocio, ktp.

Ĝenerale, oni uzas la kampon 550 por respondecaj korporacioj, kiuj estas indikitaj en sekundara alirpunkto (710). La kampo klarigas ĝian rilaton kun la eldonaĵo kaj pravigas tiun alirpunkton. La notojn rilatajn al komercaj eldonistoj, distribuantoj aŭ eldonlokoj oni registras en la kampo 500 (Ĝenerala noto).

Indikiloj:

Nedifinitaj, ambaŭ entenas blankon (#)

Ĉefa subkampo:

\$a *Noto pri respondeca korporacio (R)*

550 ## \$aRespondeca korporacio: Universala Esperanto-Asocio

550 ## \$aRespondeca korporacio <2000-2015>: Universidad Complutense de Madrid; respondeca korporacio <2016- >: Universidad de Sevilla

550 ## \$aPosta eldonanto: Kataluna Esperanto-Asocio

550 ## \$aOrgano de Potomac-side Naturalists' Club.

580 – Noto pri kompleksa rilato (R)

Priskribo de kompleksa rilato inter la dokumento priskribata en la rikordo kaj aliaj dokumentoj, kiu ne povas esti adekvate generitaj per iu el la interligaj kampoj 760-787.

Eblas uzi ĉi kampon por indiki rilaton, kiam la responda interliga kampo ne ekzistas, kiel ekzemple en reproduktaĵo, por provizi detalojn de la originala eldonaĵo, kaj en seriaĵo rilata al monografio aŭ al alia neseria eldonaĵo.

Kiam oni uzas ĉi kampon, ĝi aperas aldone al la rilata interliga kampo se ĝi ekzistas.

Indikiloj:

Nedifinitaj, ambaŭ entenas blankon (#)

Ĉefa subkampo:

Ŝa *Noto pri kompleksa rilato*

580 ## ŜaEn januaro 1933 absorbita de la japana revuo Oomoto

785 04 ŜtOomotoŜw4010

580 ## ŜaEn januaro 1933 absorbis la revuon Oomoto internacia

785 05 ŜtOomoto internaciaŜw4005

586 – Noto pri premioj (R)

Informo pri la premioj rilataj al la priskribata risurco. La kampo ripetiĝas por ĉiu premio

Indikiloj

1a: Kontrolo de la etikedo de vidigo

- Premio

586 ## ŜaAcademy Award for Best Picture, 1987

8 – Sen generita etikedo por vidigo

2a: Ne difinita, entenas blankon (#)

Ĉefa subkampo:

Ŝa *Noto pri premioj*

Kompleta teksto de la noto. Se la vorto premio aŭ ties ekvivalento en alia lingvo estas parto de la nomo de la premio, registru ĝin eĉ se vi decidis uzi la valoron # en via katalogo.

586 ## ŜaPremio EVA-Edistudio, 1989

586 ## ŜaPremio Celya de Poesía "homenaje a León Felipe", 2003 = Premio Celya de Poezio "omaĝo al León Felipe, 2003 588 – Noto pri la parto uzita kiel bazo por la priskribo

588 – Noto pri la fonto de la priskribo (R)

La noto pri la fonto de la priskribo entenas administran informon uzatan por spuri kaj kontroli la metadatenojn enhavatajn en la rikordo. Ĝi inkluzivas ĝeneralajn kaj specifajn fontajn priskribajn notojn, kiuj aparte interesas aliajn katalogistojn. Uzata ĉefe en rikordoj de serioj kaj plurvolumaj monografioj.

Indikiloj

1a: Kontrolo de la etikedo de vidigo

- Oni ne provizas informon. Uzata se la klarigo pri la enhavo estas inkludita en la subkampo Ŝa.

0 – Fonto de la priskribo. Uzata por generi la etikedon: Fonto de la priskribo.

1 – Lasta numero konsultita. Uzata por aŭtomate generi la etikedon: Lasta numero konsultita.

2a: Ne difinita, entenas blankon (#)

Ĉefa subkampo:

ŝa Noto pri la fonto de la priskribo (NR)

Noto enhavanta administran informon pri la rikordo, kiel ekzemple fonton de la priskribo aŭ plej lastan konsultitan numeron.

588 ## ŝaPriskribo bazita sur: volumo 3

588 ## ŝaLasta numero konsultita: n-ro 25

[La unua indikilo ne generas etikedon kaj oni devas registri ĝin en ŝa]

588 0# ŝaJaro 2, n-ro. 2 (Feb. 1984)

588 0# ŝaVolumo 3

[La unua indikilo generas la etikedon "Fonto de la priskribo"]

588 1# ŝaN-ro 25

[La unua indikilo generas la etikedon "Lasta numero konsultita"]

Kampoj rilataj al la alirpunktoj

La ĉefaj alirpunktoj en bibliografia rikordo havas la saman formon kaj strukturon kiel la alirpunktoj en aŭtoritataj rikordoj. Tamen, estas kelkaj aspektoj, kiuj ŝanĝiĝas, ĉefe pri la efektiva uzado de kelkaj el la subkampoj. Vidu ankaŭ la sekcion [Aŭtoritata rikordo](#).

Ĉefaj

100 – Ĉefa alirpunkto. Nomo de persono (NR)

Indikiloj:

1a: Komenca elemento de la persona nomo

0 - Persona nomo

100 0# ŝaĜanfranko

1 - Familia nomo

100 1# ŝaAuld, William

3 - Nomo de la familio (*kiam la alirpunkto rilatas al la familio kiel grupo*)

100 3# ŝaZamenhof (Familio)

2a: Nedifinita, entenas blankon (#)

Ĉefaj subkampoj

Ŝa – Nomo de persono (NR)

100 1# ŜaRichardson, David

Ŝb – Numerado (NR)

100 0# ŜaPaŭlo Ŝbla 6a, ŜcPapo

Ŝc – Titoloj kaj aliaj terminoj asociitaj al la nomo (R)

100 1# ŜaByron, George Gordon Byron, Ŝcbaron

Ŝd – Datoj asociitaj al la nomo (NR)

100 1# ŜaCervantes Saavedra, Miguel de Ŝd(1547-1616)

Ŝq – Formo disvolvita de la nomo (NR)

100 1# Ŝa Caballero, M. Ŝq(Miguel)

Ŝe – Termino indikanta funkcion (R)

100 1# ŜaDiego, Fernando de, Ŝetradukinto

Ŝ4 – Rilato (kodo pri termino indikanta la funkcion) (R)

100 1# ŜaDiego, Fernando de, Ŝetradukinto Ŝ4trl

110 – Ĉefa alirpunkto. Nomo de korporacio (NR)

Indikiloj:

1a: Komenco elemento de la korporacia nomo

0 - Nomo en inversa formo (*tre malofta*)

110 0# ŜaNewman (Jean and Dorothy) Industrial Relations Library

1 - Nomo de jurisdikcio (*kiam temas pri oficiala eldonaĵo, ekzemple*)

110 1# ŜaHispanio. ŜbComisaría Regia del Turismo

2 - Nomo en rekta formo (*la plej ofta en Esperanto-eldonaĵoj*)

110 2# ŜaUniversala Esperanto-Asocio

2a: Nedifinita, entenas blankon (#)

Ĉefaj subkampoj

Ŝa – Nomo de korporacio aŭ nomo de jurisdikcio kiel komenco elemento (NR)

110 2# ŜaUniversala Esperanto-Asocio

110 1# ŜaHispanio. ŜbComisaría Regia del Turismo

Ŝb – Subordigita unuo (R)

110 2# ŜaAsocio de Sovetiaj Esperantistoj. ŜbUkraina Respublika Filio

110 2# ŜaInternacia Katolika Unuiĝo Esperantista. ŜbKongreso

§c – Kongresloko (R)

110 2# \$aInternacia Fervojista Esperanto-Federacio.\$bKongreso\$n(22a.\$d1970.\$dRimini)

§d – Kongresdato (R)

110 2# \$aInternacia Fervojista Esperanto-Federacio.\$bKongreso\$n(22a.\$d1970.\$dRimini)

§n – Numero de la kongreso (R)

110 2# \$aInternacia Fervojista Esperanto-Federacio.\$bKongreso\$n(22a.\$d1970.\$dRimini)

§e – Termino indikanta funkcion (R)

110 2# \$aUniversala Esperanto-Asocio,\$eŭtoro

§4 – Rilato (kodo pri termino indikanta la funkcion) (R)

110 2# \$aUniversala Esperanto-Asocio,\$eŭtoro\$4aut

111 – Ĉefa alirpunkto. Nomo de kongreso (NR)

Indikiloj:

1a: Komencita elemento de la korporacia nomo

0 - Nomo en inversa formo

1 - Nomo de jurisdikcio

2 - Nomo en rekta formo

111 2# \$aUniversala Kongreso de Esperanto

2a: Nedifinita, entenas blankon (#)

§a – Nomo de kongreso kiel komenca elemento (NR)

111 2# \$aJapana Esperanto-Kongreso

§c – Kongresloko (R)

111 2#Japana Esperanto-Kongreso\$n(85a.\$d1998.\$cKanazawa)

§d – Kongresdato (R)

111 2#Japana Esperanto-Kongreso\$n(85a.\$d1998.\$cKanazawa)

§n – Kongresnumero (R)

111 2#Japana Esperanto-Kongreso\$n(85a.\$d1998.\$cKanazawa)

§j – Termino pri rilato (R)

111 2#Japana Esperanto-Kongreso\$n(85a.\$d1998.\$cKanazawa).\$jaŭtoro

§4 – Rilato (kodo pri termino indikanta la funkcion) (R)

111 2#Japana Esperanto-Kongreso\$n(85a.\$d1998.\$cKanazawa).\$jaŭtoro\$4aut

130 – Ĉefa alirpunkto. Unuforma titolo (NR)

Indikiloj:

1a: Signoj nealfabetigendaj (*vidu pli detalan klarigon en [kampo 245](#)*)

0-9 - Nombro de signoj nealfabetigendaj

130 2# \$aI costi della (non)comunicazione linguistica europea.\$lAngla

130 0# \$aKalevala

2a: Nedifinita, entenas blankon (#)

Rimarku, ke la valoroj de la indikiloj estas interŝanĝitaj respekte de la sama kampo en rikordo de aŭtoritatoj.

Ĉefaj subkampoj

\$a – Unuforma titolo (NR)

130 0# \$aŬmoto undō jūgensoku

\$d – Dato de subskribo de traktato (R)

130 0# \$aTraktato de Versajlo\$d(1919)

\$k – Forma subdivido (NR)

130 0# \$aKorano.\$kElektajo

\$l – Lingvo de la verko (NR)

130 0# \$aBhagavadgītā.\$lEsperanto

\$n – Numero de la parto aŭ sekcio de verko (R)

130 0# \$aBulletin.\$nSeries B

\$p – Nomo de la parto aŭ sekcio de verko (R)

130 0# \$aBiblio.\$pKanto de la kantoj

Sekundaraj

La kontrolitaj sekundaraj alirpunktoj (7XX) funkcias same kiel la ĉefaj (1XX) en ĉiuj aspektoj (unuaj indikiloj kaj subkampoj). La sola diferenco estas, ke en la dua indikilo, en ĉiuj kazoj, estas kroma elektebla valoro "2", analiza alirpunkto, uzata kiam la sekundara alirpunkto estas verko enhavata en la risurco kaj oni deziras rekuperi ankaŭ ĝin. Cetere, la kampoj estas ripetebla, do, eblas krei tiom da sekundaraj alirpunktoj, kiom bezonate.

700 – Sekundara alirpunkto. Nomo de persono (R)

Indikiloj:

1a: Komenco elemento de la persona nomo

0 - Persona nomo

1 - Familia nomo

3 - Nomo de la familio (*kiam la alirpunkto rilatas al la familio kiel grupo*)

2a: Tipo de sekundara alirpunkto

- Oni ne provizas informon

700 1# \$aDiego, Fernando de,\$etradukinto

[Alirpunkto por rilata aganto]

700 1# \$iAdaptaĵo de (verko)\$aTwain, Mark.\$tThe adventures of Huckleberry Finn

[Alirpunkto por rilata verko ne enhavata en la risurco]

2 – Analiza alirpunkto

700 12 \$aCervantes Saavedra, Miguel de.\$tLas dos doncellas.\$iEsperanto

[Alirpunkto por verko enhavata en la risurco]

710 – Sekundara alirpunkto. Nomo de korporacio (R)

Indikiloj:

1a: Komencita elemento de la korporacia nomo

0 - Nomo en inversa formo (*tre malofta*)

1 - Nomo de jurisdikcio (*kiam temas pri oficiala eldonaĵo, ekzemple*)

2 - Nomo en rekta formo (*la plej ofta en Esperanto-eldonaĵoj*)

2a: Tipo de sekundara alirpunkto

- Oni ne provizas informon

110 2# \$aE@l,\$erespondeca korporacio

[Alirpunkto por rilata aganto]

110 2# \$iSuplemento de (verko)\$aNational Fire Protection Association.\$tNational electrical code

[Alirpunkto por rilata verko ne enhavata en la risurco]

2 – Analiza alirpunkto

110 22 \$aKatolika Eklezio.\$bPapo (1958-1963: Johano la 23a).\$tPacem in terris.\$iEsperanto

[Alirpunkto por verko enhavata en la risurco]

711 – Sekundara alirpunkto. Nomo de kongreso (R)

Indikiloj:

1a: Komenca elemento de la korporacia nomo

0 - Nomo en inversa formo

1 - Nomo de jurisdikcio

2 - Nomo en rekta formo

2a: Tipo de sekundara alirpunkto

- Oni ne provizas informon

711 2# \$aCongreso Internacional de Medicina y Farmacia Militares\$(7a.\$d1933.\$cMadrid),\$erespondeca korporacio

[Alirpunkto por rilata aganto]

711 2# \$iResumo de (verko)\$aKoncilio Vatikana\$(2a.\$d1962-1965)\$tConstitutio dogmatica de Ecclesia

[Alirpunkto por rilata verko ne enhavata en la risurco]

2 – Analiza alirpunkto

711 22 \$aKoncilio Vatikana\$(2a.\$d1962-1965)\$tConstitutio dogmatica de Ecclesia. Esperanto

[Alirpunkto por verko enhavata en la risurco]

730 – Sekundara alirpunkto. Unuforma titolo (R)

Indikiloj:

1a: Signoj nealfabetigendaj (*vidu pli detalan klarigon en [kampo 245](#)*)

0-9 - Nombro de signoj nealfabetigendaj

2a: Tipo de sekundara alirpunkto

- Oni ne provizas informon

730 0# \$iAdaptaĵo de (verko)\$aEgils saga Skallagrímssonar

[Alirpunkto por rilata verko ne enhavata en la risurco]

2 – Analiza alirpunkto

730 02 \$aNovella del Grasso legnaiuolo.\$iEsperanto

[Alirpunkto por verko enhavata en la risurco]

740 – Sekundara alirpunkto. Nekonrolita/analiza titolo (R)

Ĉi kampon oni uzas por krei analizajn alirpunktojn por titoloj ne kontrolitaj, nome, de titoloj, kiuj ne havas aŭtoritatan rikordon en la datenbanko kaj sekve ne reprezentas preferatajn titolojn de verkoj malsame ol la titoloj registritaj en 130 kaj 100, 110, aŭ 111 + 240, 243 aŭ 245.

Eblas kodi en ĉi kapon la titolojn sekvantajn la unuan en la kampo 245 en la kazo de kompilaĵoj sen kolektiva titolo.

Indikiloj:

1a: Signoj nealfabetigendaj

0-9 - Nombro de signoj nealfabetigendaj

2a: Tipo de sekundara alirpunkto

- Oni ne provizas informon

2 – Analiza alirpunkto

Ĉefaj subkampoj

La subkampoj funkcias same kiel kiuj ajn aliaj titolaj subkampoj.

Ŝa – Nekontrrolita/analiza titolo (NR)

Ŝn – Numero de la parto aŭ sekcio de verko (R)

Ŝp – Nomo de la parto aŭ sekcio de verko (R)

245 13 ŜaDu junaj fraŭlinoj ;ŝbkaj **Korneliino** : du noveloj el la bonekzemplaj

700 12 ŜaCervantes Saavedra, Miguel de.ŝt**La señora Cornelia.**ŝ**Esperanto**

740 02 Ŝa**Korneliino**

[La preferata titolo por la traduko aperas en la sekundara alirpunkto, la kampo 740 permesas rekuperi ankaŭ la formon en Esperanto, se la mastrumsistemo havas la eblecon ordigi la indeksojn alfabete, same kiel oni faras kun la unua titolo, registrita en 245 Ŝa. Koha ne donas tiun eblecon, do, ne tre penvaloras la uzo de ĝi kampo.]

Interligaj kampoj

Post ĉi-tiuj ĝeneralaj instrukcioj por ĉiuj interligaj kampoj, estos konkretaj instrukcioj por la plej uzataj. Por pli kompleta informo, vidu la instrukciaron rekte en la originala [Formato](#).

760-787 – Interligaj kampoj. Ĝenerala informo.

Informo, kiu identigas aliajn rilatajn risurcojn. Ĉiu interliga kampo montras specifan rilaton inter la risurco priskribita en la rikordo kaj la rilata risurco. La rilatoj povas aparteni al unu el la tri sekvaj klasoj:

- 1) rilataj risurcoj, kiuj povas helpi en la serĉado, sed kiuj ne estas bezonataj por fizike atingi la serĉatan risurcon (ekzemple, rikordo de antaŭa titolo de periodaĵoj);
- 2) rilataj risurcoj bezonataj por fizike atingi la serĉatan risurcon (ekzemple, la fonto-risurco por atingi unu el ties komponantoj: la numero de gazeto, kie troviĝas specifan artikolon);
- 3) rilataj dokumentoj, kiuj estas parto de pli granda unuo (ekzemple, konkreta volumo de plurvoluma monografio).

La interligaj kampoj estas dezajnitaj por generi noton en la rikordo en kiuj ili aperas. Ili ankaŭ povas provizi elektronikan ligilon inter la rikordoj de la rilataj risurcoj, se ambaŭ havas rikordon en la katalogo.

Indikiloj:

1a: Kontrolo de la noto

0 – Montras noton

Noto estas generita surbaze de la datenoj de la interliga kampo.

1 – Ne montras noton

Oni uzas la valoron 1 kiam la etikedo asociita al la interliga kampo ne taŭge priskribas la rilaton. En tiu kazo oni redaktas noton en la kampo 580. La interligaj kampoj utilas por provizi la ligilon kaj la kampo 580 por klarigi la rilaton.

2a: Kontrolo de la asociita etikedo

Por ĉiuj kampoj escepte de 780 kaj 785

- [Etikedo ligita al la koncerna kampo]

0 – Ĉefa eldonaĵo [Nur por kampo 772]

8 – Sen generita etikedo por vidigo

Por kampo 780 vidu la valorojn en [780 – Ligilo al antaŭa titolo](#)

Por kampo 785 vidu la valorojn en [785 – Ligilo al posta titolo](#)

Ĉefaj sukampoj

Ŝa – Ĉefa alirpunkto (NR)

Datenoj de la ĉefa alirpunkto el la kampoj 100 (nomo de persono), 110 (nomo de korporacio), aŭ 111 (nomo de kongreso) en la rilata rikordo. La individuaj elementoj de la nomoj ne iras en apartaj subkampoj, kiel en kampo 1XX.

Rilata rikordo:

100 1# ŜaMellor, Alec.

245 10 ŜaStrange masonic stories

Interliga kampo:

775 0# ŜaMellor, Alec.ŜtStrange masonic stories

Ŝg – Rilata(j) parto(j) (R)

Informo pri la specifa(j) parto(j) de la rilata risurco, kiel datoj aŭ volumoj.

772 1# ŜtDevelopmental biologyŜg1972-1974

773 0# ŜtHorizonŜgVol. 17, no. 98 (Feb. 1948), p. 78-159

Ŝi – Informo pri la rilato (R)

Indiko de la rilato inter la risurco priskribita en la kampo 760-787 kaj la risurco priskribita en la kampoj 1XX/245 de la rikordo. Ĉi indiko povas havi la formon de nekontrolita teksto aŭ esti kontrolita teksta valoro. La dua indikilo enhavas valoron 8 (Sen generita etikedo por vidigo) krom en kampoj 780 kaj 785, kiam oni deziras vidigi la informon de ĉi subkampo. La subkampo \$i povas aperi antaŭ la ceteraj subkampoj.

100 1# \$aVerdi, Giuseppe, \$d1813-1901.
245 10 \$aOtello :\$bin full score /\$cGiuseppe Verdi.
700 1# \$iLibreto bazita sur (verko) \$aShakespeare, William, \$d1564-1616. \$tOthello.
787 08 \$iReproductaĵo de (manifestiĝo) \$aVerdi, Giuseppe, \$d1813-1901. \$tOtello.\$d Milan: Ricordi, c1913

Vidigo por la uzanto en la katalogo:

Verdi, Giuseppe, \$d 1813-1901. Otello : in full score / Giuseppe Verdi

Reproduktaĵo de: Verdi, Giuseppe, 1813-1901. Otello. Milan : Ricordi, c1913

Libreto bazita sur: Shakespeare, William, \$d 1564-1616. Othello.

\$t – Titolo (NR)

Informo pri la ĉeftitolo de la rilata rikordo. Ĝi inkludas la subkampojn \$a, \$f, \$g, \$k, \$n kaj \$p de la kampoj 245 aŭ 130 se tio aplikeblas.

Rilata rikordo:

245 00 \$aArmy, Navy, Air Force register.

580 ## \$aKunfandita kun: Army, Navy, Air Force journal, por formi ...

Interliga kampo:

785 17 \$tArmy, Navy, Air Force journal

\$w – Kontrolnumero de la rilata rikordo (R)

Kontrolnumero, kiun la sistemo asignas al la rilata rikordo. Ĝi povas iri antaŭata de la MARC-kodo de la biblioteko en kiu aplikeblas tiu kontrolnumero²⁰.

780 00 \$tTechniques of biochemical and biophysical morphology

\$w(DLC)###72000153#\$w(OCOLC)1021945

780 00 \$tReview of existential psychology & psychiatry**\$w(DLC)sf#77000170#**

785 17 \$tAdult correctional services in Canada**\$w(CaOONL)840790694E**

\$x - Internacia Norma Numero por Seriaĵoj (ISSN) (NR)

ISSN de seriaĵo prenita el kampo 022 (Internacia Norma Numero por Seriaĵoj) de la rilata rikordo.

Noto: La siglo ISSN, kiuj antaŭas la numeron ne estas inkludita en la rikordo, sed povas esti generita de la sistemo kiel asociita etikedo de la subkampo \$x.

245 00 \$aAnnual law review /\$cUniversity of Western Australia.

²⁰ Por la funkciado de la sistemo, la MARC-kodo de la biblioteko ne necesas. Multaj bibliotekoj ne uzas ĝin. Jen ekzemplo de BJRP en Koha: 772 0# \$tEsperanto\$x0014-0635**\$w3401**. Tamen, ĝi estas utila se rikordo apartenas al du datenbankoj, la propran de la biblioteko kaj tiun de kolektiva katalogo.

Ŝz - Internacia Norma Libro-Numero (ISBN) (R) [ĉiuj kampoj escepte de 760, 762]

ISBN prenita el la kampo 020 (Internacia Norma Libro-Numero) de la rilata rikordo. (EL ISBN es un elemento de información asignado por una agencia.) Nota: La siglo ISBN, kiuj antaŭas la numeron ne estas inkludita en la rikordo, sed povas esti generita de la sistemo kiel asociita etikedo de la subkampo Ŝz.

Rilatoj inter rikordoj kaj notoj*Interligaj kampoj (760-787)*

Ĉi kampoj enhavas priskribajn datenojn pri la rilata risurco, pri la kontrol numero de la rikordo de la rilata risurco aŭ pri ambaŭ. Oni provizas tiel minimuman identigon de la rilata risurco. La subkampo Ŝw (kontrolnumero de la rilata rikordo) permesas, ke la sistemo, provizu la kompletan datenaron de la rilata risurco. La valoro uzata en la unua indikilo, determinas ĉu oni generas noton surbaze de tiu kampo aŭ pere de la kampo 580.

En la kampoj 760-787 oni starigas la ĝeneralan rilaton laŭ la elektita etikedo. En la kampoj 772, 780 kaj 785, eblas starigi pli specifajn rilatojn pere de la indikiloj. Oni uzas la subkampon Ŝi por tiuj rilatoj, kiuj povas esti esprimitaj per neniu etikedo aŭ indikilo kaj ĝi pli taŭgas por starigi pli konkretajn rilatojn

Noto pri kompleksa rilato (kampo 580)

Kiam la rilato estas tro kompleksa por esti esprimita pere de la indikilo de la etikedo aŭ la subkampo Ŝi, oni registras la noton en la kampo 580. Kiam oni uzas ĉi kampon, ĝi aperas en la rikordo kune kun la respondaj kampoj 760-787 kaj oni ne generas noton surbaze de la interliga kampo.

Aldonaj alirpunktoj (kampoj 700-730)

Se oni bezonas aldonan alirpunkton por titolo uzita en interliga kampo, oni registras la alirpunkton en la responda kampo 700-730. La interligaj kampoj ne povas anstataŭi la aldonajn alirpunktojn. Same, aldona alirpunkto en la kampoj 700-730 ne povas anstataŭi interligan kampon, ĉar ili ne povas generi noton aŭ inkludi ligilojn al aliaj rikordoj.

Komponentoj

La interliga kampo 773 (ligilo al la fonto-dokumento) estas uzata por starigi la rilaton inter la rikordo de komponanto, kiu estas integra parto de alia risurco, kun la rikordo de ĉi lasta. Ekzemple, en la rikordoj de la artikoloj de iu revuo, la kampo 773 enhavas la identigon de la revuo. Kaj la subkampo Ŝg provizas la ekzaktan lokalizon (numero/paĝoj) de la artikolo en la revuo. Reciproke, la rikordo de la fonto-dokumento aŭ de pli granda bibliografia unuo povas inkludi rilatan informon kun la komponantaj partoj, registritaj en la kampo 774 (ligilo al komponanta parto), kiu estas ripetebla. La informo pri ĉiu komponanto bezonas apartan kampon 774. Ĉi ebleco estas utila, ekzemple, por starigi rilaton inter monografio kaj la eseoj enhavataj en ĝi, se la biblioteko trovas tion utila por siaj uzantoj.

770 – Ligilo al suplemento/speciala numero (R)

Informo pri la suplementoj aŭ specialaj numeroj asociitaj al la katalogata risurco, katalogataj sendepende.

Indikiloj:

1a: Kontrolo de la noto

0 – Montras noton

1 – Ne montras noton

2a: Kontrolo de la asociita etikedo

- Suplemento (aŭ Havas suplementon)

8 – Sen generita etikedo por vidigo

Ĉefaj sukampoj

\$t, \$x, \$w (vidu klarigon en la antaŭa rubriko pri ĝeneral informo de la interligaj kampoj).

245 00 \$aEsperanto :\$boficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

770 0# \$tBelarto\$w2948

[Rikordo de la ĉefa eldonaĵo; la interliga kampo kondukas al la rikordo de suplemento]

245 00 \$aJournal of cellular biochemistry.

770 0# \$tJournal of cellular biochemistry. Supplement\$x0733-1959

[Rikordo de la ĉefa eldonaĵo; la interliga kampo kondukas al la rikordo de suplemento]

Ekzemplo de vidigo en Koha (la etikedo, ankoraŭ ne esperanten tradukita en Koha) estas generita de la valoro # de la dua indikilo:

Supplement: Belarto

772 – Ligilo al la ĉefa eldonaĵo (R)

Informo pri la ĉefa rikordo, kiam la katalogata risurco estas unika numero, suplemento aŭ speciala numero de la ĉefa eldonaĵo.

Indikiloj:

1a: Kontrolo de la noto

0 – Montras noton

1 – Ne montras noton

2a: Kontrolo de la asociita etikedo

- Suplemento de

8 – Sen generita etikedo por vidigo

Ĉefaj sukampoj

\$t, \$x, \$w (vidu klarigon en la antaŭa rubriko pri ĝeneral informo de la interligaj kampoj).

245 00 \$aBelarto :\$baldono al la revuo "Esperanto"

772 0# \$tEsperanto\$x0014-0635\$w3401

[Rikordo de la suplemento; la interliga kampo kondukas al la rikordo de la ĉefa eldonaĵo]

245 00 \$aRevuo :\$bmonata aldono al Esperanto triumfonta

772 0# \$tEsperanto triumfonta\$w3403

[Rikordo de la suplemento; la interliga kampo kondukas al la rikordo de la ĉefa eldonaĵo]

Ekzemplo de vidigo en Koha (la etikedo, ankoraŭ ne esperanten tradukita en Koha) estas generita de la valoro # de la dua indikilo:

Supplement to: [Esperanto 0014-0635](#)

773²¹ – Ligilo al la fonto-dokumentoj (R)

Ĉi kampo utilas por ebligi al la uzanto lokalizi la fizikan pecon, kiu enhavas la priskribatan komponentan parton aŭ subunuoj. Por tio sufiĉas inkludi en la kampo la identigajn datenojn de la rilata dokumento, kiel, ekzemple, la ligilon al la rikordo, kiu priskribas la fonto-dokumenton aŭ la priskribajn datenojn, kiuj identigas ĝin.

Indikiloj:

1a: Kontrolo de la noto

0 – Montras noton

1 – Ne montras noton

2a: Kontrolo de la asociita etikedo

- En:

8 – Sen generita etikedo por vidigo

Ĉefaj sukampoj

\$t, \$g, \$x, \$w (vidu klarigon en la antaŭa rubriko pri ĝeneral informo de la interligaj kampoj).

773 0# \$tGilbert H. Grosvenor Collection of Photographs of the Alexander Graham Bell family

[La fonto-dokumenton oni identigas per la titolo]

773 0# \$tHorizon\$gVol. 17, no. 98 (Feb. 1948), p. 78-159

[La fonto-dokumenton oni identigas per la titolo]

773 0# \$gVol. 2, no. 2 (Feb. 1976), p. 195-230\$w(DLC)###75001234#

²¹ Koha havas apartan proceduron por starigi la rilaton de komponanto kun la fonto-dokumentoj: *create analytics* (nome, krei analizan rikordon)

[La fonto-dokumenton oni identigas per la kontrolnumero]

773 0# \$aDesio, Ardito, 1897-ŝtGeographical features of the Karakorum. \$dMilano : ISMEO, 1991

[La fonto-dokumenton oni identigas per la aŭtoro kaj la titolo]

773 0# \$tBeletra almanako\$gN-ro 21 (oktobro 2014)\$w36

[La fonto-dokumenton oni identigas per la titolo kaj la kontrolnumero]

Ekzemplo de vidigo en Koha (la etikedo, ankoraŭ ne esperanten tradukita en Koha) estas generita de la valoro # de la dua indikilo:

In: **Beletra almanako N-ro 21 (oktobro 2014)**

774 – Ligilo al komponanta parto (R)

Komponento povas esti parto de ununura bibliografia unuo, de dokumento konsistanta el pluraj volumoj aŭ partoj, aŭ de kolekto. La komponanta parto povas esti priskribita aŭ ne en aparta rikordo.

Indikiloj:

1a: Kontrolo de la noto

0 – Montras noton

1 – Ne montras noton

2a: Kontrolo de la asociita etikedo

- Komponanta parto:

8 – Sen generita etikedo por vidigo

Ĉefaj sukampoj

\$t, \$w (vidu klarigon en la antaŭa rubriko pri ĝeneral informo de la interligaj kampoj).

245 10 \$a[136th Street, southeastern section of the Bronx]

774 0# \$tMap of area with highlighted street

774 0# \$tView of Mill Brook Houses from one of the houses

774 0# \$tView SE from Mill Brook Houses on rooftop on Cypress Ave. between 136th St. and 137th St.

774 0# \$tView N from 136th St. roof top area between Bruckner Expressway and Cypress Ave.

774 0# \$tView E from rooftop of garden bounded by Bruckner Expressway, 136th St. and 135th St.

[La rikordo estas tiu de la plej granda bliografia unuo; la kampoj 774 donas aliron al la komponantaj partoj]

775 – Ligilo al alia eldono (R)

Ligilo al plia disponebla eldono de la katalogata verko. En ĉi kampo oni registras jenajn eldonojn:

- Eldonoj en aliaj lingvoj. En la kazo de seriaj eldonaĵoj publikigita samtempe en pli ol unu lingvo (kutime de la sama eldonanto, male ol tradukoj, kiuj ĝenerale estas publikigitaj de alia eldonanto).
- Represoj. Kiam la katalogata seriaĵo estas represo, oni uzas la kampon 775 por ligi la originalan eldonon.
- Aliaj eldonoj. Ĝenerale, ĉi eldonoj havas la saman titolon kiel la katalogata sed kun ia informo pri eldono, kiu distingas ilin.

Indikiloj:

1a: Kontrolo de la noto

0 – Montras noton

1 – Ne montras noton

2a: Kontrolo de la asociita etikedo

- Plia disponebla eldono:

8 – Sen generita etikedo por vidigo

Ĉefaj sukampoj

\$t, \$x, \$e, \$w (vidu klarigon en la antaŭa rubriko pri ĝeneral informo de la interligaj kampoj).

130 0# \$a aCuba economic news.\$iSpanish.

245 10 \$aCuba noticias económicas.

580 ## \$aIssued also in English: Cuba economic news.

775 01# \$tCuba economic news\$x0590-2932\$eeng \$w(OCOLC)2259984

[La katalogata risurco estas en la hispana lingvo; la kampo 775 donas aliron al la risurco en la angla]

245 00\$aCommunist

264 #1 \$aNew York,\$bGreenwood Reprint Corp.,\$c1968

580 ## \$aReprint of a periodical published weekly in Chicago by the National Organization Committee of the Communist Party of America.

775 0# \$tCommunist\$w9387439

[La katalogata risurco estas represo de periodaĵo; la kampo 775 donas aliron al la originala eldonaĵo]

776 – Ligilo al alia fizika formato (R)

Informo rilata al aliaj fizikaj disponeblaj formatoj de la katalogata risurco. Oni uzas ĉi kampon por ligi rikordojn de la sama verko en pluraj formatoj

Indikiloj:

1a: Kontrolo de la noto

0 – Montras noton

1 – Ne montras noton

2a: Kontrolo de la asociita etikedo

- disponebla en alia formato:

8 – Sen generita etikedo por vidigo

Ĉefaj sukampoj

\$t, \$x, \$w (vidu klarigon en la antaŭa rubriko pri ĝeneral informo de la interligaj kampoj).

245 00 \$aCollege English.

530 ## \$aAlso available on microfilm from University Microfilms.

776 0# \$tCollege English\$x0010-0994\$w(DLC)sc#84007753# \$w(OCOLC)3546316

[La rikordo estas de la papera risurco; la kampo 776 donas aliron al la mikrofilmaĵo]

780 – Ligilo al antaŭa titolo (R)

Informo pri la titolo tuj antaŭa titolo de la katalogata risurco. Se estas pli ol unu antaŭa titolo, oni ripetas la kampon 780.

La valoroj de la dua indikilo montras pli precize la rilaton inter ambaŭ titoloj.

Indikiloj:

1a: Kontrolo de la noto

0 – Montras noton

1 – Ne montras noton

2a: Kontrolo de la asociita etikedo

0 – Daŭrigas (aŭ antaŭa titolo)

1 – Parte daŭrigo de

2 – Anstataŭas

3 – Parte anstataŭas

4 – Kunigo de ... kaj ...

5 – Absorbis

6 – Parte absorbis

7 – Disigita de

Ĉefaj sukampoj

\$t, \$x, \$w (vidu klarigon en la antaŭa rubriko pri ĝeneral informo de la interligaj kampoj).

245 00 \$aHeroldo de Esperanto :\$bneŭtrala organo de la Esperanto-movado

780 00 \$tEsperanto triumfonta\$x2943-7369\$w3403

[La rikordo estas de Heroldo de Esperanto; la kampo 780, dua indikilo kun valoro 0, donas aliron al la antaŭa titolo]

245 00 \$aOomoto :\$bmonata gazeto esperantista

780 05 \$tOomoto internacia\$w4005

[La rikordo estas de Oomoto; la kampo 780, dua indikilo kun valoro 5, donas aliron al antaŭa titolo, kiu estis absorbita de la katalogata risurco]

Ekzemploj de vidigo en Koha (la etikedo, ankoraŭ ne esperanten tradukita en Koha) estas generita de la respektivaj valoroj de la dua indikilo:

Continues: **Esperanto triumfonta**

Absorbed: **Oomoto internacia**

785 – Ligilo al posta titolo (R)

Informo pri la titolo tuj posta titolo de la katalogata risurco. Se estas pli oli unu posta titolo, oni ripetas la kampon 785.

La valoroj de la dua indikilo montras pli precize la rilaton inter ambaŭ titoloj.

Indikiloj:

1a: Kontrolo de la noto

0 – Montras noton

1 – Ne montras noton

2a: Kontrolo de la asociita etikedo

0 – Daŭrigata de (aŭ posta titolo)

1 – Parte daŭrigata de

2 – Anstataŭita de

3 – Parte anstataŭita de

4 – Absorbata de

5 – Parte absorbata de

6 – Disigita en ... kaj ...

7 – Kunfandita kun ... por formi ...

8 – Denove nomata

Ĉefaj sukampoj

\$t, \$x, \$w (vidu klarigon en la antaŭa rubriko pri ĝeneral informo de la interligaj kampoj).

245 00 \$aEsperanto triumfonta :\$bĵurnalo internacia, universala, sendependa

785 00 \$t Heroldo de Esperanto\$x0018-0823\$w3404

[La rikordo estas de Esperanto triumfonta; la kampo 785, dua indikilo kun valoro 0, donas aliron al la posta titolo]

245 00 \$aOomoto internacia :\$bmonata organo de la Universala Homama Asocio

785 04 \$tOomoto\$w4010

[La rikordo estas de Oomoto internacia; la kampo 785, dua indikilo kun valoro 4, donas aliron al posta titolo, kiu absorbis ĝin]

Ekzemploj de vidigo en Koha (la etikedo, ankoraŭ ne esperanten tradukita en Koha) estas generita de la respektivaj valoroj de la dua indikilo:

Continued by: **Heroldo de Esperanto**

Absorbed by: **Oomoto**

787 – Aliaj rilatoj

Informo pri rilata risurco, kiam neniu el la kampoj 760-786 taŭgas por difini la rilaton. Plej ofte, ĝi estas akompanata de noto en la kampo 580 por klarigi la specifan rilaton.

Indikiloj:

1a: Kontrolo de la noto

0 – Montras noton

1 – Ne montras noton

2a: Kontrolo de la asociita etikedo

- Rilata dokumento

8 – Sen generita etikedo por vidigo

130 0# \$aEmpire State report (1982)

580 ## \$aKomplementita de: Empire State report weekly.

787 0# \$tEmpire State report weekly\$x0745-8622\$w84647299

[Ligilo al la eldonaĵo, kiu komplementas la risurcon priskribatan.]

856 – Elektronikaj lokalizo kaj aliro (R)

Oni registras en ĉi kampon la informojn bezonatajn por trovi kaj aliri elektronikan risurcon. Ĝi uzeblas kiam la risurco, aŭ parto de ĝi, estas havebla elektronike. Ĝi ankaŭ uzeblas por trovi kaj aliri elektronikan version de ne-elektronika risurco priskribita en la bibliografia rikordo, aŭ rilatan elektronikan risurco.

Oni ripetas la kampon 856 kiam la informo pri lokalizo varias (la URL en subkampo \$u). Oni ankaŭ ripetas ĝin, inter alie, kiam pli ol unu alirmetodo estas uzata, malsamaj partoj de dokumento estas haveblaj elektronike aŭ kiam pluraj rilataj dokumentoj estas registritaj.

Indikiloj:

1a: Alirmetodo

- # – Oni ne havigas informon
- 0 – Repoŝto
- 1 – Dosiertransiga protokolo (FTP)
- 2 – Fora ensaluto (Telnet)
- 3 – Telefonvoko
- 4 – HTTP** (*Verŝajne, la plej ofte uzata*)
- 7 – Metodo specifita en la subkampo \$2

2a: Rilato

- # - Oni ne havigas informon
- 0 – Risurco (*Oni donas aliron al la risurco mem, ekzemple, al bitgazeto retpublikigita*)
- 1 – Versio de la risurco (*Oni donas aliron, ekzemple, al bitigita versio de la risurco*)
- 2 – Rilata risurco (*Oni donas aliron al alia risurco rilata al la priskribata risurco*)
- 3 – Komponenta(j) parto(j) de la risurco
- 4 – Versio de la komponanta(j) parto(j) de la risurco
- 8 – Sen generita etikedo por vidigo

Ĉefaj subkampoj

\$u – Unuforma Risurca Identigilo (URI)

Ĝi enhavas la Unuforman Risurcan Identigilon, kiu donas aliron al la risurco

856 41 \$u<http://hdl.handle.net/11013/5249>

\$y – Ligila teksto

Ĝi enhavas la tekston videblan en la rikordo, kiu anstataŭas la ligilon

856 41 \$u<http://hdl.handle.net/11013/5249>\$y**Disponebla en Bitoteko**

856 42 \$u<http://hdl.handle.net/11013/4487>\$y**Sondosieroj disponeblaj en Bitoteko**

880 – Alternativa grafika reprezento (R)

Kompleta alternativa grafika reprezento, en malsama skribo, de alia kampo de la sama rikordo.

La kampo 880 kaj la asociita kampo estas reciproke ligitaj per la subkampo \$6 (Ligilo). La informo de la kampo 880 povas esti en pli ol unu skribo.

Indikiloj:

La indikiloj en kampo 880 havas la saman signifon kaj valorojn kiel la respondaj indikiloj en la asociita kampo kaj ne estas priskribitaj en ĉi tiu sekcio. Vidu la priskribon de la specifa asociita kampo.

1a: La sama kiel en la asociita kampo.

2a: La sama kiel en la asociita kampo.

Subkampoj

\$a-z – La samaj kiel en la asociita kampo

Por priskribo de la subkampoj, vidu la sekciojn kiuj priskribas la rilatajn kampojn.

\$0-5 – La samaj kiel en la asociita kampo

Por priskribo de la subkampoj, vidu la sekciojn kiuj priskribas la rilatajn kampojn.

\$6 – Ligilo (NR)

Datenoj ligantaj kampojn, kiuj havas reprezentojn en malsamaj skriboj unu respekte de la alia. La subkampo \$6 povas enhavi la etiket-numeron de asociita kampo, apernumeron, identokodon de la unua skribo legante la kampon de maldekstre dekstren, kaj indikon pri la orientiĝo de la inform-vidigo.

La subkampo \$6 havas jenan strukturon:

\$6[ligetikedo]-[apernumero]/[identokodo de la skribo]/[identokodo de la orientiĝo de la kampo]

La subkampo \$6 ĉiam aperas unuavice en la respondaj kampoj.

Ligetikedo kaj apernumero

La ligetikedo enhavas la MARC-etikedon de la asociita kampo. Sekvas ĝin streketo kaj la du ciferoj indikantantaj la apernumeron. Ĉiu paro de asociitaj kampoj ricevas malsaman apernumeron. La apernumero permesas al la sistemo starigi la interrilaton inter la asociitaj kampoj, ne havas ordigan funkcion ene de la rikordo.

Identokodo de la skribo

La apernumero estas sekvata de klinita streko (/) kaj la kodo, kiu identigas la skribon. Oni uzas sekvajn kodojn:

Kodo	Skribo
(3	Araba
(B	Latina

\$1	Ĉina, japana, korea
(N	Cirila
(S	Greka
(2	Hebrea

Ne necesas, ke la tuta kampo estu en la skribo identigita de la subkampo \$6. Se aperas pli ol unu skribo, la subkampo \$6 enhavas la identokodon de la unua alternativa skribo legante la kampon de maldekstre dekstren.

La identokodo de la skribo aperas en la subkampo \$6 de la kampo 880, sed oni ne uzas ĉi elementon en la subkampo \$6 de la asociita kampo. Oni supozas, ke en la asociita kampo, la datenoj estas en la ĉefa skribo de la rikordo.

Identokodo de la orientiĝo de la kampo

En MARC-rikordo, oni registras la enhavojn de la kampo 880 en ties logika ordo, de la unua ĝis la lasta signo, sendepende de la orientiĝo de la kampo. Por la vidigo de la kampo, la implicita orientiĝo estas de maldekstre dekstren. Kiam orientiĝo de la teksto enhavata en la kampo devas esti de dekstre maldekstren, klinita streko (/) kaj la identokodo de la orientiĝo de la kampo sekvas la identokodon de la skribo. La identokodo de orientiĝo de la kampo por skriboj de dekstre maldekstre estas la litero “r”.

La kodon de orientiĝo oni inkludas nur en kampoj kun orientiĝo de dekstre maldekstren, ĉar la orientiĝo de maldekstre dekstren estas tiu implicita en la kampoj 880.

La identokodo de la orientiĝo de la kampo aperas en la subkampo \$6 de la kampo 880, sed oni ne uzas ĉi elementon en la subkampo \$6 de la asociita kampo. Oni supozas, ke en la asociita kampo, la datenoj estas en la normala orientiĝo de la ĉefa skribo de la rikordo.

880 10 \$6245-01/(N\$a[cirila skribo] /\$c[cirila skribo]

880 10 \$6245-01/(3/r\$a[araba skribo] /\$c[araba skribo]

\$7-9 – La samaj kiel en la asociita kampo

Por priskribo de la subkampoj, vidu la sekciojn kiuj priskribas la rilatajn kampojn.

AŬTORITATA RIKORDO²²

En la datenbanko pri aŭtoritato oni kreas nur unu aŭtoritan rikordon por ĉiu bibliografia personeco, sendepende de tio, ĉu tiu aganto rolas kiel ĉefa respondeculo de verko aŭ kiel sekundara. Ekzemple, la aŭtoritata formo de la nomo de William Auld estas ĉiam la sama, ne gravas ĉu li estas la aŭtoro (100), la tradukinto (700) aŭ la temo de verko (600).

000-Kapo

Same kiel en la responda kampo de la bibliografia rikordo, ĝi havas 24 poziciojn komenciĝantajn per 0 kaj kelkaj valoroj aperas implicite en la sistemo. Tiuj valoroj sufiĉas por niaj bibliotekoj kaj ĝenerale, ni devos modifi nenion en ĉi kampo.

Nur sciu, ka la pozicio *06 Tipo de rikordo*, enhavas ĉiam la valoron “z”, kiu signifas aŭtoritan rikordon.

Kontrolkampoj

001 – Kontrolnumero

Kontrolnumero asignita al la rikordo aŭtomate generita de la sistemo.

003 – Identigilo de la kontrolnumero

Same kiel en la kampo [003](#) de bibliografia rikordo.

005 – Dato kaj horo de la lasta modifo de la rikordo

Same kiel en la kampo [005](#) de bibliografia rikordo.

008 – Informkodoj de fiksa longeco. Ĝenerala informo

Same kiel la kampo 008 de bibliografia rikordo, ĝi provizas koditan informon pri la rikordo kiel tuto. Ĝi havas 40 poziciojn komenciĝantajn per 0. Kelkaj el ili, specifaj por la diversaj aspektoj de la alirpunkto.

La valoroj, kiujn la sistemo donas implicite, ĝenerale sufiĉas. Ne necesas modifi ilin. Tamen, foje estas interese doni informon pri tio, ĉu la aŭtoritato estas plene starigita aŭ ne. Tion oni faras en la pozicio 33 de la kampo. La implicita valoro estas “c” (provizora) kaj ĝi devas resti kun tiu valoro tiom longe, kiom oni ne plene studas la aŭtoritaton (ekzemple, kiam oni kreas nur la alirpunkton sen redakti noton por pravigi la elekton de la formo). Se la aŭtoritato estas plene studita, oni registras nomovariantojn kaj redaktas pravigan noton por la elekto de la preferata formo, la valoro de tiu pozicio povas esti ŝanĝita al “a” (plene akceptita). La ceteraj eblaj valoroj ne havas vere praktikan uzon por Esperanto-biblioteko.

Kampoj pri numeroj kaj kodoj

024 – Aliaj normaj identigiloj (R).

Norma numero aŭ kodo aŭ URI²³ asociita kun la ento nomita en la kampo 1XX. Se estas pluraj identigiloj, registru ĉiun en aparta kampo.

Indikiloj:

²² <https://www.loc.gov/marc/authority/>

²³ URI. Unuforma Risurca Identigilo, angle: Uniform Resource Identifier.

1a: Tipo de norma numero aŭ kodo

7 – Fonto specifita en la subkampo \$2

8 – Ne specifita tipo de norma numero aŭ kodo

2a: nedifinita (*entenas blankon #*)

Ĉefaj subkampoj:

\$a – Norma numero aŭ kodo aŭ URI (NR) (Preferindas URI, se tio eblas)

\$q – Aldona informo (R)

\$z – Nevalida aŭ nuligita numero (R)

\$2 – Fonto (NR)

MARC-kodo²⁴ de la terminaro uzata por identigi la enton nomitan en la kampo 1XX.

024 7#\$aT-345246800-1\$2iswc

024 7#\$a0A9-2002-12B4A105-6\$2istc

024 7# \$ahttp://viaf.org/viaf/73885295\$2viaf

024 7# \$ahttps://isni.org/isni/0000000109153407\$2isni

024 7# \$ahttps://www.wikidata.org/entity/ Q11758\$2wikidata

[Identigoj por L.L. Zamenhof]

040 – Fonto de la katalogado (NR)

Same kiel en la kampo [040](#) de bibliografia rikordo.

Kampoj pri ĉefaj alirpunktoj

100 – Ĉefa alirpunkto. Nomo de persono (NR)

Indikiloj:

1a: Komenca elemento de la persona nomo

0 - Persona nomo

100 0# \$aĜanfranko

1 - Familia nomo

100 1# \$aAuld, William

3 - Nomo de la familio (*kiam la alirpunkto rilatas al la familio kiel grupo*)

²⁴ <https://www.loc.gov/standards/sourcelist/standard-identifier.html>

100 3# \$aZamenhof (Familio)

2a: Nedifinita, entenas blankon (#)

Ĉefaj subkampoj

Partoj de la nomo:

\$a – Nomo de persono (NR)

100 1# \$aRichardson, David

\$b – Numerado (NR)

100 0# \$aPaŭlo \$bla 6a, \$cPapo

\$c – Titoloj kaj aliaj terminoj asociitaj al la nomo (R)

100 1# \$aByron, George Gordon Byron, \$cbaron

100 1# \$aCortini, Marta \$c(kuracisto)

\$d – Datoj asociitaj al la nomo (NR)

100 1# \$aCervantes Saavedra, Miguel de \$d(1547-1616)

\$q – Formo disvolvita de la nomo (NR)

100 1# \$a Caballero, M. \$q(Miguel)

Partoj de la titolo:

Ĉiuj subkampoj rilataj al la titolo estas registritaj en la kampoj 240 aŭ 243 de la bibliografia rikordo se la alirpunkto estas la ĉefa. Tamen, la aŭtoritaton oni kreas kompleta en la aŭtoritata rikordo.

\$k– Subdivido pri formo (R)

100 1# \$aSchiller, Friedrich. \$tPoezio. \$kElektajo

\$l – Lingvo de la verko (NR)

100 1# \$aSzilágyi, Ferenc. \$tLa liberiĝo de la juĝisto. \$lHispana

\$n – Numero de parto aŭ sekcio de la verko (R)

100 0# \$aHomero. \$tOdiseado. \$nKanto 1

\$p – Nomo de parto aŭ sekcio de la verko (R)

100 1# \$aYamasaki, Seikô. \$tEtimologia vortareto pragmata de Esperanto. \$pSuplemento

100 1# \$aO'Connor, James Charles. \$tKonkordanco al la Krestomatio. \$nUnua parto, \$pLa participoj

\$t – Titolo de la verko (NR)

100 1# \$aYamasaki, Seikô. \$tEtimologia vortareto pragmata de Esperanto

Partoj de la temo:

Uzeblaj nur kiam persona nomo estas temo de verko kaj oni devas precizigi ĝin. Koha provizas aŭtomate la interpunkcion (--).

\$v – Forma subtermino (R)

100 0# \$aZamenhof, Lidia--\$vRomanoj

\$x – Ĝenerala subtermino pri temo (R)

100 1# \$aŜtimec, Spomenka--\$xVojaĝoj

100 1# \$aOosugi, Sakae--\$xBiografioj

100 1# \$aMattos, Geraldo--\$xKritiko kaj interpreto

\$y– Kronologia subtermino (R)

600 10 \$aShakespeare, William--\$xKritiko kaj interpreto--\$xHistorio--\$y18a jarcento

\$z – Geografia subtermino (R)

600 10 \$aFord, Gerald R.--\$xMuzeoj--\$zMichigan

110 – Ĉefa alirpunkto. Nomo de korporacio (NR)

Indikiloj:

1a: Komenca elemento de la korporacia nomo

0 - Nomo en inversa formo (*tre malofta*)

110 0# \$aNewman (Jean and Dorothy) Industrial Relations Library

1 - Nomo de jurisdikcio (*kiam temas pri oficiala eldonaĵo, ekzemple*)

110 1# \$aHispanio.\$bComisaría Regia del Turismo

2 - Nomo en rekta formo (*la plej ofta en Esperanto-eldonaĵoj*)

110 2# \$aUniversala Esperanto-Asocio

2a: Nedifinita, entenas blankon (#)

Ĉefaj subkampoj

Partoj de la nomo:

\$a – Nomo de korporacio aŭ nomo de jurisdikcio kiel komenca elemento (NR)

110 2# \$aUniversala Esperanto-Asocio

110 1# \$aHispanio.\$bComisaría Regia del Turismo

\$b – Subordigita unuo (R)

110 2# \$aAsocio de Sovetiaj Esperantistoj.\$bUkraina Respublika Filio

110 2# \$aInternacia Katolika Unuiĝo Esperantista.\$bKongreso

\$c – Kongresloko (R)

110 2# \$aInternacia Fervojista Esperanto-Federacio.\$bKongreso\$n(22a.\$d1970.\$dRimini)

\$d – Kongresdato (R)

110 2# \$aInternacia Fervojista Esperanto-Federacio.\$bKongreso\$n(22a.\$d1970.\$dRimini)

\$n – Kongresnumero (R)

110 2# \$aInternacia Fervojista Esperanto-Federacio.\$bKongreso\$n(22a.\$d1970.\$dRimini)

Partoj de la titolo:

Ĉiuj subkampoj rilataj al la titolo estas registritaj en la kampoj 240 aŭ 243 de la bibliografia rikordo se la alirpunkto estas la ĉefa. Tamen, la aŭtoritaton oni kreas kompleta en la aŭtoritata rikordo.

\$k – Subdivido pri formo (R)

110 2# \$aLibrary of Congress.\$bCongressional Research Service.\$tSoviet diplomacy and negotiating behavior.\$lJapana.\$kElektajo

\$l – Lingvo de la verko (NR)

110 2# \$a Katolika Eklezio.\$bPapo (1958-1963: Johano la 23a).\$tPacem in terris.\$lEsperanto

\$n – Numero de parto aŭ sekcio de la verko (R)

110 1# \$aPhilippines.\$tLabor Code of the Philippines.\$nBook 5

\$p – Nomo de parto aŭ sekcio de la verko (R)

110 1# \$aPhilippines.\$tLabor Code of the Philippines.\$nBook 5,\$pLabor Relations

\$t – Titolo de la verko (NR)

110 2# \$a Katolika Eklezio.\$bPapo (1958-1963: Johano la 23a).\$tPacem in terris

Partoj de la temo:

Uzeblaj nur kiam korporacia nomo estas temo de verko kaj oni devas precizigi ĝin. Koha provizas aŭtomate la interpunkcion (--).

\$v – Forma subtermino (R)

110 1# \$aUsono--\$xSocia helpo--\$vPeriodaĵoj

\$x – Ĝenerala subtermino pri temo (R)

110 2# \$aMondpaca Esperantista Movado--\$xHistorio

\$y – Kronologia subtermino (R)

110 2# \$aOomoto--\$xHistorio--\$y20a jarcento

\$z – Geografia subtermino (R)

110 2# \$aKatolika Eklezio--\$zGermanio

111 – Ĉefa alirpunkto. Nomo de kongreso (NR)

Indikiloj:

1a: Komencas elemento de la korporacia nomo

0 - Nomo en inversa formo

1 - Nomo de jurisdikcio

2 - Nomo en rekta formo

111 2# \$aUniversala Kongreso de Esperanto

2a: Nedifinita, entenas blankon (#)

Ĉefaj subkampoj

Partoj de la nomo:

\$a – Nomo de kongreso kiel komencas elemento (NR)

111 2# \$aJapana Esperanto-Kongreso

\$c – Kongresloko (R)

111 2#Japana Esperanto-Kongreso\$(85a.\$d1998.\$cKanazawa)

\$d – Kongresdato (R)

111 2#Japana Esperanto-Kongreso\$(85a.\$d1998.\$cKanazawa)

\$n – Kongresnumero (R)

111 2#Japana Esperanto-Kongreso\$(85a.\$d1998.\$cKanazawa)

Partoj de la titolo:

Ĉiuj subkampoj rilataj al la titolo estas registritaj en la kampoj 240 aŭ 243 de la bibliografia rikordo se la alirpunkto estas la ĉefa. Tamen, la aŭtoritaton oni kreas kompleta en la aŭtoritata rikordo.

\$k– Subdivido pri formo (R)

111 2# \$aInternational Conference on Safety of Life at Sea\$(1960.\$cLondono).\$tFinal act of conference with annexes.\$kElektaĵoj

\$l – Lingvo de la verko (NR)

111 2# \$aBiennale di Venezia\$(1980).\$tCatalogo generale 1980.\$lAngla

\$n – Numero de parto aŭ sekcio de la verko (R)

111 2# \$aBiennale di Venezia\$(1980).\$tCatalogo generale 1980.\$nPart 3

\$p – Nomo de parto aŭ sekcio de la verko (R)

111 2# \$aBiennale di Venezia\$(1980).\$tCatalogo generale 1980.\$nPart 3,\$pBrazil

\$t – Titolo de la verko (NR)

111 2# \$aKoncilio Vatikana\$(2a.\$d1962-1965).\$tConstitutio dogmatica de Ecclesia

Partoj de la temo:

Uzeblaj nur kiam kongreso estas temo de verko kaj oni devas precizigi ĝin. Koha provizas aŭtomate la interpunkcion (--).

\$v – Forma subtermino (R)

111 2# \$aGrundtvig-Seminario\$d(2015.\$cHerzberg am Harz)--\$vVerkoj ilustritaj

\$x – Ĝenerala subtermino pri temo (R)

111 2# \$aKataluna Esperanto-Kongreso--\$xHistorio

\$y– Kronologia subtermino (R)

111 2# \$aInternacia Junulara Kongreso--\$xHistorio--\$y20a jarcento

\$z – Geografia subtermino (R)

111 2# \$aInternacia Junulara Kongreso--\$xHistorio--\$zEŭropo

130 – Ĉefa alirpunkto. Unuforma titolo (NR)

Indikiloj:

1a: Nedifinita, entenas blankon (#)

2a: Signoj nealfabetigendaj (*vidu pli detalan klarigon en [kampo 245](#)*)

0-9 - Nombro de signoj nealfabetigendaj

130 #2 \$aI costi della (non)comunicazione linguistica europea.\$lAngla

130 #0 \$aKalevala

Rimarku, ke la valoroj de la indikiloj estas interŝanĝitaj respektive de la sama kampo en bibliografia rikordo.

Ĉefaj subkampoj

Partoj de la titolo:

\$a – Unuforma titolo (NR)

130 #0 \$aŌmoto undō jūgensoku

\$d – Dato de subskribo de traktato (R)

130 #0 \$aTraktato de Versajlo\$d(1919)

\$k – Forma subdivido (NR)

130 #0 \$aKorano.\$kElektaĵo

\$l – Lingvo de la verko (NR)

130 #0 \$aBhagavadgītā.\$lEsperanto

\$n – Numero de la parto aŭ sekcio de verko (R)

130 #0 \$aBulletin.\$nSeries B

\$p – Nomo de la parto aŭ sekcio de verko (R)

130 #0 \$aBiblio.\$pKanto de la kantoj

Partoj de la temo:

Uzeblaj nur kiam unuforma titolo estas temo de verko kaj oni devas precizigi ĝin. Koha provizas aŭtomate la interpunkcion (--).

\$v – Forma subtermino (R)

130 #0 \$aGawain and the Grene Knight--\$vBibliografio

\$x – Ĝenerala subtermino pri temo (R)

130 #0 \$aTill Eulenspiegel--\$xKritiko kaj interpreto

\$y – Kronologia subtermino (R)

130 #0 \$aKorano--\$xKritiko kaj interpreto--\$xHistorio--\$y19a jarcento

\$z – Geografia subtermino (R)

130 #0 \$aBiblio--\$zGermanio

Kampoj por nomovariantoj – Referencitipo: Vidu. (R)

La kampojn 4XX en aŭtoritataj rikordoj oni uzas por registri aliajn formojn de la nomoj malsamaj de tiuj akceptataj kiel preferataj.

En ĉiu kazo, oni konstruas ilin same kiel la respondajn kampojn 1XX, kun la samaj valoroj en la indikiloj kaj la samaj subkampoj.

En la katalogo inter la kampoj 1XX kaj 4XX oni starigas la rilaton “Vidu” aŭ “Uzita de” por gvidi la uzanton de la ne akceptita al la akceptita preferata formo de la nomo.

100 0# \$aOuida

400 1# \$aDe La Ramée, Marie Louise

110 2# \$aGermana Esperanto-Junularo

410 2# \$aGEJ

410 2 # \$aDeutsche Esperanto-Jugend

111 2# \$aInternacia Junulara Kongreso

410 2# \$aTutmonda Esperantista Junulara Organizo.\$bKongreso

411 2# \$aIJK

130 #0 \$a Aladin

430 #3 \$aLa mirinda lampo

430 #0 \$aMil kaj unu noktoj.\$pAladin

Jen ekzemplo pri vidigo en Koha:

Camacho, Jorge (Personal Name)

Nombro da rikordoj uzitaj en: 26

Preferata formo: Camacho, Jorge

Uzita por/vidu de:

- Camacho Cordón, Jorge
- Kamaĉo, Georgo

Kampoj por nomovariantoj – Referencitipo: Vidu ankaŭ (R)

La kampojn 5XX en aŭtoritataj rikordoj oni uzas por registri aliajn akceptitajn formojn de la nomoj registritaj en 1XX. Ekzemple, pseŭdonimojn aŭ rilatajn korporaciojn kaj kongresojn.

En ĉiu kazo, oni konstruas ilin same kiel la respondajn kampojn 1XX, kun la samaj valoroj en la indikiloj kaj la samaj subkampoj. Sed en ĉi kampo povas esti utila la subkampo \$w, ĉefe en kelkaj kazoj de korporacioj, por difini la rilaton inter la akceptataj formoj. Uzu ĝin laŭ la juĝo de kataloganto.

\$w – Subkampo de kontrolo

- a – antaŭa alirpunkto (*Earlier heading*)
- b – posta alirpunkto (*Later heading*)

Ekzistas pli da valoroj sed la verŝajne plej uzeblaj estas tiuj du.

En la katalogo inter la kampoj 1XX kaj 5XX oni starigas la rilaton “*Vidu ankaŭ*” por gvidi la uzanton de unu akceptita formo al la alia.

100 0# \$aLudovikito

500 1# \$aKanzi, Itô

110 2# \$aAkademio de Esperanto

510 2# \$wa\$aLingva Komitato.\$bAkademio

111 2# \$aKongreso de Iberiaj Esperantistoj

510 2# \$wa\$aDiskutanta Kunveno de Esperantistoj de Iberiaj Landoj

510 2# \$wb\$aHispana Kongreso de Esperanto

130 #0 \$aDossiers Cinéma d'aujourd'hui

530 #0 \$aaCollection Cinéma d'aujourd'hui.\$pDossiers

Jen ekzemplo pri vidigo en Koha:

Akademio de Esperanto (Corporate Name)

Nombro da rikordoj uzitaj en: 4

Preferata formo: Akademio de Esperanto

Uzita por/vidu de:

- AdE

Vidu ankaŭ:

- Earlier heading: [Lingva Komitato. Akademio](#)

Kampoj por starigi kompleksajn referencojn

Estas pluraj kampoj por starigi kompleksajn referencojn, sed ĉi tiu estas la plej bezonata. Trovu informon pri la ceteraj rekte en la formato.

663 – Kompleksa referenco: Vidu ankaŭ (NR)

Per ĉi kampo oni kompletigas informon inter la diversaj alirpunktoj de aŭtoritata rikordo, kiam ĝin ne eblas plene dedukti el la simplaj rilatoj starigitaj pro la uzoj de la koncernaj kampoj.

Taŭga nur en aŭtoritaj rikordoj pri personaj nomoj.

Indikiloj:

1a: Nedifinita, entenas blankon (#)

2a: Nedifinita, entenas blankon (#)

Ĉefaj subkampoj

ŝa – Klariga teksto (R)

Enhavas enkondukan frazon kiel, ekzemple: *Por verkoj de ĉi aŭtoro verkitaj sub reala nomo, vidu ankaŭ:*

ŝb – Rilata alirpunkto (R)

Enhavas la rilatan alirpunkton

100 1# ŝaLöwenstein, Anna

500 1# ŝaBrennan, Anna

663 ## ŝaPor verkoj de ĉi aŭtoro verkitaj sub pseŭdonimo, vidu ankaŭ:ŝbBrennan, Anna

100 1# ŝaWaringhien, Gaston

500 1# ŝaMaura, G. E.

500 1# ŝaGuni, Arieĥ ben

500 1# ŝaPeneter, Georgo Peterido

663 ## ŝaPor verkoj de ĉi aŭtoro verkitaj sub pseŭdonimoj, vidu ankaŭ:ŝbMaura, G. E.,ŝbGuni, Arieĥ ben,ŝcPeneter, Georgo Peterido

Kampoj pri notoj

Estas pluraj kampoj pri notoj, sed ĉi tiu estas la plej bezonata. Trovu informon pri la ceteraj rekte en la formato.

670 – Noto pri konsultita fonto (R)

Indikiloj:

1a: Nedifinita, entenas blankon (#)

2a: Nedifinita, entenas blankon (#)

Ĉefaj subkampoj

ŝa – Citita fonto (NR)

ŝb – Informo trovita (NR)

ŝu – URI (R)

Trovu ampleksan klarigon pri la uzo de ĉi kampo kaj ekzemplojn en la rubriko *Noto pri la konsultita fonto* en la sekcio *Kreado de aŭtoritataj rikordoj* de la *Manlibro pri katalogado*.

EKZEMPLERA RIKORDO²⁵

Oni kreas unu rikordon por ĉiu ekzemplero, sendepende de tio, ĉu la ekzemplero konsistas el unu aŭ pli da volumoj.

000-Kapo

Same kiel en la antaŭaj kazoj, ĉi kampo havas 24 poziciojn komenciĝantajn per 0 kaj kelkaj valoroj aperas implicite en la sistemoj. Plej verŝajne, tiuj valoroj sufiĉos por viaj bibliotekoj kaj ĝenerale, vi devos modifi nenion en ĉi kampo.

Nur la pozicio *06 Tipo de rikordo* ŝanĝendas. Jen la elekteblaj valoroj:

- u – Nekonata
- v – Plurparta dokumento (*se temas pri plurvoluma eldonaĵo*)
- x – Unuparta dokumento (*la plej ofta kazo*)
- y – Seriaĵo (*se temas pri gazetoj aŭ periodaĵoj*)

Kontrolkampoj kaj kampoj pri numeroj

003 – Identigilo de la kontrolnumero

Same kiel en la kampo [003](#) de bibliografia rikordo.

005 – Dato kaj horo de la lasta modifo de la rikordo

Same kiel en la kampo [005](#) de bibliografia rikordo.

008 – Informkodoj de fiksa longeco. Ĝenerala informo

Same kiel la kampo 008 de bibliografia rikordo, ĝi provizas koditan informon pri la rikordo kiel tuto. Ĝi havas 32 poziciojn komenciĝantajn per 0.

La valoroj, kiujn la sistemo donas implicite, verŝajne sufiĉos por via biblioteko.

040 – Fonto de la katalogado (NR)

Same kiel en la kampo [040](#) de bibliografia rikordo.

Kampoj pri notoj kaj lokalizo

561 – Historio pri proprieto kaj prizorgo (R)

Indikiloj:

1a: Privateco

– oni ne donas informon

0 – privata

1 – ne privata

2a: Nedifinita, entenas blankon (#)

²⁵ <https://www.loc.gov/marc/holdings/>

Ĉefa subkampo

ŝa – Historio (NR)

Registru ĉi-tie informon rilatan al la antaŭaj posedantoj de tiu ekzemplero kaj, se ĝi estas grava kaj konata, la historio de la ekzemplero ĝis alveno al via biblioteko. Registru ĉi-tie ankaŭ la informon pri vendoprezoj, ekslibrisoj, sigeloj, ktp.

561 ## \$aDonacita de Rafael Martínez kaj Carlos Fiol

561 ## \$aGluebla ekslibriso de Edward Ockey

563 – Informo pri la bindaĵo (R)

Indikiloj:

1a: Nedifinita, entenas blankon (#)

2a: Nedifinita, entenas blankon (#)

Ĉefa subkampo

ŝa – Noto pri la bindaĵo (NR)

Registru ĉi-tie la tipon de bindaĵo de la ekzemplero.

563 ## \$aRigida bindaĵo

563 ## \$aLeda blua bindaĵo

852 – Lokalizo (R)

Indikiloj:

1a: Bretar-skemo

– oni ne donas informon

0 – Klasifiko de Library of Congress

1 – Dewey Decimala Klasifiko

2 – Klasifiko de National Library of Medicine

3 – Klasifiko de Superintendent of Documents

4 – Kontrolnumero en bretaro

5 – Titolo

6 – Disa lokigo

7 – Fonto specifita en subkampo \$2

8 – Alia skemo

2a: Bretar-ordo

- oni ne donas informon

0 – sen numerado

1 – ĉefa numerado

2 – alternativa numerado

Por Esperanto-bibliotekoj sufiĉas la valoro (#) en ambaŭ kazoj.

Ĉefaj subkampoj

Ŗa – Lokigo (NR)

Institucio aŭ persono, kiu posedas la ekzempleron aŭ pere de kiu oni aliras ĝin. Ĝi enhavas jen MARC-kodon de la havanta institucio, jen la nomo de la institucio aŭ de la persono

852 ## ŖaBiblioteko Juan Régulo Pérez

852 ## ŖaES-MaBJR

Ŗb – Sublokigo aŭ kolekto (R)

Specifa departamento, biblioteko, ktp., ene de la posedanta organizaĵo en kiu la dokumento troviĝas aŭ pere de kiu, ĝi estas disponebla

852 ## ŖaBiblioteko Juan Régulo PérezŖbKolekto de HEF

852 ## ŖaES-MaBJRŖbHEF

Ŗj – Kontrolnumero en la bretaro (NR)

Kontrolnumero uzata kiel ordiga sistemo en la bretaro. Registru do, en ĉi subkampon la kompletan signaturon necesan por lokalizi la ekzempleron: sinsekvaj numeroj, signaturo bazita sur iu klasifik-sistemo, ktp.

852 ## ŖaBiblioteko Juan Régulo PérezŖbKolekto de HEFŖjjsk-14/2

852 ## ŖaBiblioteko Juan Régulo PérezŖbKolekto de MELŖj0391-0393

[Registro por trivoluma eldonaĵo, la signaturoj de la volumoj estas sinsekvaj numeroj registritaj en la sama Ŗj]

Ŗd – Antaŭa lokalizo (R)

Malnova signaturo aŭ lokalizo, kie troviĝis antaŭe la risurco, en la kazo de translokigo aŭ rearanĝo/reorganizado de la kolekto. Kelkaj bibliotekoj metas antaŭe la latinan adverbbon *Olim*. Esperantaj bibliotekoj povas uzi la esprimon *Antaŭa signaturo*. Kvankam ĝi strikte ne necesas, tio helpas la serĉadon de tiu specifa kategorio de signaturoj.

852 ## ŖaBiblioteko Juan Régulo PérezŖbKolekto de HEFŖjjsk-14/2ŖdAntaŭa signaturo: 2145

Ŗq – Fizika kondiĉo de la ekzemplero (R)

Priskribo de iu nekutima karakterizaĵo de la fizika kondiĉo de la ekzemplero. Registru ĉi tie informojn pri la mankantaj partoj de la ekzemplero kaj ĝia fizika stato, krom la priskribo de la bindaĵo, kiu iras en la kampo 563.

852 ## \$aBiblioteko Juan Régulo Pérez\$bKolekto de HEF\$jsk-14/2\$qMankas titolpaĝo kaj unuaj folioj ĝis paĝo 12

\$x – Nepublika noto (R)

Registru ĉi-tie tiun informon ne registreblan en aliaj subkampoj seninteresa por la publiko sed eventuale utila por la prizorgantoj de la biblioteko.

852 ## \$aBiblioteko Juan Régulo Pérez\$bKolekto de HEF\$jsk-14/2\$xElsarkenda

\$z – Publika noto (R)

Registru ĉi-tie tiun informon ne registreblan en aliaj subkampoj interesa por la publiko.

852 ## \$aBiblioteko Juan Régulo Pérez\$bKolekto de HEF\$jsk-14/2\$zNoto manskribita en la titolpaĝo: J. Martín \$zKunbindita kun aliaj verkoj

856 – Elektronikaj lokalizo kaj aliro (R)

Same kiel en la kampo [856](#) de bibliografia rikordo.

866 – 868 Teksta mencio pri havaĵoj. Ĝeneral informo.

Kampoj uzataj por informi pri la havaĵoj de biblioteko en rilato al la priskibata serioĵo.

Indikiloj:

1a: Nivelo de kodado.

Nivelo de specifeco de la informo pri numerado kaj kronologio registrita en la kampo.

– Oni ne donas informon

3 – Havaĵoj nivelo 3 (la kampo enhavas resuman informon).

4 – Havaĵoj nivelo 4 (la kampo enhavas detalan informon).

5 – Havaĵo nivelo 4 kun mencio de peco (la kampo enhavas detalan informon kaj identigan numeron por la fizika peco en la subkampo \$a).

Por esperantaj bibliotekoj sufiĉas la valoro # en la unua indikilo.

2a: Tipo de notacio

0 - Ne normigita (la informo pri havaĵoj oni ne registras per normigita notacio).

1 – ANSI/NISO Z39.71 o ISO 10324 (la informo pri havaĵoj oni registras laŭ La normo *Holdings Statements for Bibliographic Items (Z39.71)* aŭ laŭ la normo *Holdings Statements-Summary level (ISO 10324)*).

2 – ANSI Z39.42 (la informo pri havaĵoj oni registras laŭ la normo *ANSI Z39.42, Serial Holdings Statements at the Summary Level*, jam obsoleta).

7 – Fonto specifita en subkampo \$2 (se oni sekvas normon malsaman al la antaŭe menciitaj).

Se oni sekvas la instrukciojn proponitajn en la Manlibro pri katalogado. Serioĵoj, oni uzu la valoron 1 por la dua indikilo. Se oni sekvas nenian normon, uzu la valoron 0.

Ĉefaj subkampoj

ŝa – Teksta mencio pri havaĵoj (NR)

Enhavas informon pri la havaĵoj disponeblaj en la biblioteko.

ŝz – Publika noto (R)

Noto rilata al la dokumento, kiun oni deziras fari publika.

ŝx – Nepublika noto (R)

Noto rilata al la dokumento, de interna uzo, kiun oni ne deziras fari publika. Utila por la mastrumado de la kolekto.

ŝ2 – Fonto (NR)

MARC-kodo kiu identigas la fonton el kiu la notacio uzita por registri la informon pri havaĵoj estas prenita. Prenu la kodon el *Holding Scheme Source Codes*²⁶.

866 – Teksta mencio pri havaĵoj. Baza bibliografia unuo (R).

Ĉi kampo enhavas la priskribon de la konkretaj partoj de iu serio havataj de la biblioteko.

Unue, oni indikas la jaro(j)n konservata(j)n en la biblioteko, kiuj respondas la jaroj de amplekso²⁷ de la eldonaĵo, en ŝa. En ŝz oni indikas la konkretajn numerojn konservatajn, ripetante la subkampon por ĉiu nekompleta jaro.

866 #1 ŝa1890(1891-1892)ŝz1891: oni konservas: 2. época t. 2: n. 2 (feb.)- t. 3: n. 5 (mayo), t. 4: n. 8 (ag.)- t. 5: n. 12 (dic.)ŝz 1892: oni konservas: 2. época: t. 6: n. 13 (en.)

866 #1 ŝa(1751-1752),1755-1800ŝz 1751: mankas la numeroj de: jan., jun.ŝz 1752: mankas la numeroj: 12, 14-16, 20, 22-23

867 – Teksta mencio pri havaĵoj. Komplementa materialo (R).

Ĉi kampo enhavas informon pri la konservataj suplementoj kaj aldona materialo.

Oni uzas ĝin se la suplementoj estas taŭge identigitaj per konkreta numerado aŭ kronologio, aŭ se ne havante propran numeradon aŭ kronologion, ili estas identigeblaj ene de la ĉefa eldonaĵo, enmetitaj en ĝi kaj eblas indiki al kiu volumo aŭ jaro ili apartenas

866 #1 ŝa1890-1899

867 #1 ŝaN-ro 1 (jan. 1895)- n-ro 12 (dec. 1895)

[Suplemento monate publikigita kune kun la ĉefa eldonaĵo (registrita en 866) kun propra numerado aŭ kronologio]

866 #1ŝa1890-1899

867 #1 ŝaSuplemento por la jaroj 1895-1896

[Suplemento sen propra numerado aŭ kronologio. La ĉefa eldonaĵo estas registrita en 866]

²⁶ <https://www.loc.gov/standards/sourcelist/holding-scheme.html>

²⁷ Amplekso: angle, *coverage*; hispane, *cobertura*.

868 – Teksta mencio pri havaĵoj. Indeksoj (R).

Ĉi kampo enhavas informon pri la indeksoj eldonitaj kune kun la ĉefa eldonaĵo.

866 #1 \$a1890-1899

868 #1 \$aIndekso de propraj nomoj n. 1-5 (1890-1895)

[Indekso jare publikigita kune kun la ĉefa eldonaĵo, kun propra numerado kaj distinga titolo]

866 #1 \$a1890-1899

868 #1 \$aIndekso de aŭtoroj (1890-1895)

[Indekso publikigita kune kun la ĉefa eldonaĵo, sen propra numerado kaj kun distinga titolo]

866 #1 \$a1890-1899

868 #1 \$aN. 1-5 (1890-1895)

[Indekso jare publikigita kune kun la ĉefa eldonaĵo, kun propra numerado kaj sen distinga titolo]